

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 98, Septembro 2018



Rememoroj aperas...

Karaj amikoj! Finiĝis la somero, kun pluraj renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kursoj... Venis la aŭtuno, dum kiu ni komencas rikolti la rezultojn de tiu aktiva sezono kaj komenci plani la sekvajn. Ni gratulas ĉiujn niajn membrojn pro la bonaj rezultoj de la somera aktivado kaj deziras al ĉiuj esti same aktivaj en la nova agadperiodo!

*Estraro de REU
Renkontiĝoj*

RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ – 2018 (RET-2018)

Mi ŝatas RET-ojn, kaj jam multajn el ili mi sukcese partoprenis. Sed verdire ĉi-jare, pro diversaj kaŭzoj en la laborejo, mi dubis ĝis la lastaj tagoj, ĉu mi trafos RETon-2018. Feliĉe la sorto turnis sin vizaĝe al mi kaj donacis al mi tiun eblon.

Nia vojo al RET kaj ĝia unua tago

Mi devas diri, ke al la urbeto Ŝujo, kie okazis la ĉi-jara RET, mi vojaĝis la unuan fojon ne per trajno, kiel kutime, sed per aŭto, ĉar jekaterinburga esperantisto Sergej Kumkov laŭvoje dum sia vojaĝo al la internacia kongreso de matematikistoj en Francio afable kunveturigis min al restadejo de RET – eksa bieno de fabrikanto Neburĉilov. Ni komencis la vojaĝon la 30-n de junio frumatene kaj bonorde veturis, ja Sergej lerte kaj leĝobeeme stiris la aŭton. Tre baldaŭ restis malproksime de ni la urbaj bruo, rumoro, homamasoj kaj dekoj de haladraj busoj, kaj ni veturis ĝuante someron, bonan sunan veteron, belajn ŝanĝiĝantajn laŭvoje pejzaĝojn, la simpatian kompanion de la kunvojaĝantoj. Tio estis agrabla aŭtomobila ekskurso tra Rusio. Trans la fenestro ĉio estis somerplene intenskolora kaj pompa: tiaj smeraldverdaj montetoj, senlimaj kampoj, inunditaj de maro de diverskoloraj infloreskoj, vastaĵoj, malfermitaj al vento, sur kiuj pigre paŝtiĝis bovinoj. Tiom da beleco ĉirkaŭe! Oni povis rompi la kolon, ofte turnante ĝin por rigardi diversajn detalojn kaj kaptante la kolorojn! Haltante dum la vojo por iom “knedi” la muskolojn kaj manĝi en apudvojaj kafejoj, tranoktinte unu nokton en hoteleto por aŭtovojaĝantoj, en la dua vojaĝtago ni atingis tre simpatian urbeton Gorodec de Niĵegoroda provinco, kiu situas sur la liva bordo de la rivero Volgo kaj kiun Sergej intence enigis en nian itineron kiel vidindaĵon. Ni komencis nian konatiĝon kun la urbo de la vizito de Dipatrinprotektita preĝejo, de kie laŭ la strato, paralela al la fludirekto de Volgo, piediris al la malnova centro de la urbo.

Malgraŭ sia juneca nomo Gorodec estas preskaŭ same antikva urbo, kiel Moskvo, kaj estis fondita nur je kvin jaroj malpli frue ol ĝi, en la 1152-a jaro. Vere ora tempoperiodo por la urbo estis fine de la XIX-a – komence de la XX-a jarcentoj, kiam ĝi iĝis tre riĉa negocista urbo. La historia centro de Gorodec bone konservis sian etnan unikecon. Sur la ne tre granda “stratostro”, formita de la stratoj “A.Rublĵov” kaj “A. Nevskij”, eblas vidi multajn malnovajn belajn domojn de negocistoj, kun tradiciaj rusaj ornamaĵoj kaj mirindaj tabuloj de fenestraj kadroj. Inter ili elstaris domo de ĉielblua koloro, sur kiu kiel fajnaj volutoj ŝvebis nubetoj de la blankaj ornamaĵoj. Tio estis muzeo de samovaroj, kiun ni plezure vizitis kaj vidis la plej grandan en Rusio kolekton de samovaroj, kie estis prezentitaj tavernaj, porvojaj, hotelaj, “tet-a tet“-aj specimenoj k.a. Bazon de la kolekto konsistigas privata kolekto de honora loĝanto de la urbo Nikolao Poljakov. La plej granda samovaro en la kolekto estis 53-litra, kaj la plej malgranda nur 75 gramojn peza.

Nemultaj scias, ke la malnovitana centro Gorodec delonge famas pro siaj spickuketoj, tiel nomataj “prĵanikoj”. Fine de la XIX-a jarcento ĉi tie funkciis ne malpli ol 15 bakejoj, kaj oni produktis 30 specojn de diversaj spickuketoj. En la sovetia tempo ĉio ĉi malaperis, sed en la 70-aj jaroj la metiejo renaskiĝis. Nun la plej grandan spickukon, kiu pezas 20 kilogramojn, oni bakas por la ĉiujara festivalo “Frataro de popolmetiistoj. Tiun interesan rakonton mi aŭdis en la memoraĵbutiko dum la aĉetado de granda dolĉa kuko el Gorodec por regali miajn amikojn – esperantistojn en RET.

La viziton de ĉiuj aliaj interesaj muzeoj ni lasis por iama sekva fojo. Anstataŭ tio ni volonte promenis laŭ la kajo de la rivero Volgo, de tie ĝuis vidaĵojn, fotiĝis apud la monumento al Aleksandro Nevskij kaj tra ombraj belaj stratetoj kun malnovaj dometoj, florantaj kaj dolĉe odorantaj tilioj, ni revenis al la loko, kie ni lasis nian aŭton, por daŭrigi la vojaĝon. Ankoraŭ kelkaj horoj, kaj jen ni jam estas en “Ripozejo Bor”, proksime de Ŝujo, kie okazas RET. Sergej kun du siaj gekolegoj povis resti tie nur por unu tago, kaj mi certe partoprenis ĝin plenperiede.

Post nia konatiĝo kun la bazejo, kies vasta kaj bela teritorio antaŭe estis bieno de la negocista familio Neburĉilov, kun bela malnova konstruaĵo – domo de la bienmastroj, post la malsupreniĝo al la rivero Teza, kiu fluas tute apude de tiu domo, ni iris enloĝiĝi en komforta ligna duĉambra dometo, kun ĉiuj oportunaĵoj ene kaj kun teraso, kie eblis sidi tutkompanie ĉe la tablo kun samovaro, plezure trinkante teon kaj malstreĉe babilante kun la amikoj. Vere, la bazejo estis bonega: lignaj dometoj, abunda vegetaĵaro, florantaj floroj kaj arbustoj, agrablaj benkoj kaj altiraj balanciloj – ĉio estis por la agrabla ripozo. La ĉirkaŭanta la bazejon loko ankaŭ ĉarmis nin tuj: pitoreska arbaro, plena de beroj, tre proksime situanta rivero kun mirinde belaj vidaĵoj, neforgeseblaj sunsubiroj vespere. Tia beleco! La naturo, kuracanta post la longa vintro kaj pluva printempo niajn lacajn animojn! Ĉio ĉi tre ĝojigis kaj inspiris nin!



Dum la unua vespero post la vespermanĝo mi kaj Sergej volonte partoprenis la kantovesperon, kiun gvidis Mikaelo Povorin kaj Evelina Sokolova, ĝojis al varma amika rondo, plezure kantis kune kun ĉiuj komunajn kantojn. Post tio ni longe sidis en la teraso de nia dometo, teŭmante kaj komunikigante pri diversaj temoj.

La dua tago de RET-2018

La dua tago de RET komenciĝis de la bela frumatena promenado en la ĉirkaŭaĵoj: mi iris iom esplori la apudan arbaron. Senhaste mi paŝis laŭ arbaraj padoj, ĝuante la belecon, kiun kreis la granda majstro _ naturo. La someran arbaron plenigis diversvoĉeco de birdoj, maro de sonoj kaj susuroj; en ĝi estis freŝeco kaj pureco de la aero, en ĝi abundis tre hela kaj sukplena verdaĵo en roso, kiel en arĝento. Ankaŭ sur mola subpieda herbo, kuŝis matena roso, ŝanĝbrilante irize kaj foje el la herbaro "rigardis la ruĝaj okuletoj" de arbara frago, kaj, se mi kliniĝis al ili, mi perceptis ĝian delikatan aromon. Multaj padoj estis ombraj, sed pluraj jam inunditaj de la lumo kaj suno, sur ili tie kaj tie videblis blankaj, flavaj kaj rozkoloraj floretoj, kiuj ĝojigis la okulojn. Mallaŭte bruis arboj: sveltaj betuloj, majestaj kverkoj, altaj aceroj kaj abietoj, dolĉe odorantaj tilioj, la suno disjetis laŭ ili siajn diverskolorajn brilaĵojn, kaj en la foliaro super mia kapo kiel en fabela rondodanco sonis gajaj kantoj de diversaj birdoj. Inter ili unu birdeto kantis plej laŭte, mi ne vidis ĝin, sed sentis ĝian ĝojon kaj senzorgecon. Jen ankaŭ kukolo komencis laŭte kalkuli ies jarojn. Inter foliaro dense bluis la ĉielo kun flosantaj sur ĝi negrandaj blankaj nubetoj. Facila vento balancis tigojn de trifolioj kaj kamomiloj, min zigzage preterflugis granda belega papilio... Eblus longe ĝui ĉion tion, sed malicaj kuloj, kiuj kiel nigra nubo, ĉirkaŭis min kaj senkompate mordegis, ne permesis longe resti en la arbaro kaj forpelis min el sia arbara densejo. Mi forkuris de ili, tamen kun dankemo al la arbaro pro tio, ke ĝi aligis min al universaj ritmoj de harmonio kaj beleco. Dum la restado en RET, mi sukcesis ankoraŭ kelkfoje promeni en la arbaro kaj eĉ kune kun mia samĉambranino Tatjana Loskutova mi povis kolekti tie fragojn kaj ni regalis nin per la aroma arbara frandaĵo.

Post la matenmanĝo miaj kunvojaĝantoj el Jekaterinburgo forlasis min por veturi plu direkte al Eŭropo. Post la adiaŭo kun ili, mi iris al la leciono de la kurso por A2-nivelo, kiun gvidis Vladimir Opletajev. Mi preferis ĉeesti la tutan lian kurson, vidi la metodikon de lia instruado, observi kiel li konstruas siajn lecionojn, kiujn materialojn li preparis kaj uzis dum la kurso. Nu min kiel ĉiam pli interesas la praktikaj aferoj, kaj mi kiel ĉiam pensis pri la estonteco de la urala Esperanto-movado, kies tre grava parto sendube estas instruado de la lingvo, kiu nun lamas en Jekaterinburgo.

Mi volus mencii, ke en tiu tago okazis tre rimarkinda ŝtormo, fulmotondro kaj forta pluvego. La ŝtormo komenciĝis post la tagmanĝo, antaŭ la dua leciono de la kurso por komencintoj. Tiutempe teŭmante ni sidis kelkope en la teraso de la dometo kaj observante la furiozon de la naturo kaj la torentan pluvon, mi pensis, ke apenaŭ iu el la kursanoj ekkuraĝos tiumomente iri el siaj dometoj al la kursejo kaj ili plej verŝajne atentos finon de la ŝtormo. Sed subite mi ekvidis Jan Karapetjan (unu el la kursanoj), kiu kovrinte la kapon per sia anorako, kuregis direkte al la kursejo. Lia diligenteco ankaŭ min instigis kuri al la kurso:) Pro la ŝtormo estis difektita elektra linio, kaj la bazejo dum iu tempo restis plene sen elektro, sed malgraŭ ĉio la vespermanĝo okazis ĝustatempe kaj estis kiel ĉiam bongustega, ĉar kuiristoj uzis dum la kuirado rezervitan naturan gason. Post iom da tempo oni riparigis la difektitan lokon, kaj vespere ni jam ĝojis pri la reveno de la elektro en la bazejon.

En la dua vespero de RET okazis vingustumado, dum kiu oni rakontis al ni historion de la uzino "Ŝujskaja vodko", kiu estis fondita en la jaro 1899 kaj ĝis nun estas fama pro la produktado de bongustaj beraj likvoroj kaj vaste konata balzamo "Malnova Ŝujo". En la produktado oni uzas purigitan arzezan akvon el la propra arteza putro kun la profunde de 125 metroj, grajnan alkoholon kaj nur naturajn berojn: ĉerizajn, ribajn, oksikokajn, kamemorajn kaj aliajn. Poste ni havis la ŝancon gustumi kelkajn specojn de likvoroj, kaj dum la interŝanĝo de opinioj pri ilia gusto, evidentiĝis, ke nia publiko plej ŝatis la likvoron el sekprunoj, kiun ni povis aĉeti poste kiel memoraĵon el Ŝujo dum nia ekskurso tra la urbo. Al ĉiuj tre plaĉis ankaŭ la aroma balzamo "Malnova Ŝujo". Post la vingustumado ni ĉiuj bonhumoraj kaj kontentaj daŭrigis jam la komunikadon en pli malvastaj amikoj rondoj, teŭmante en la terasoj de niaj dometoj.

La tria tago de RET. Ekskurso al Ŝujo. Lignofajro.

Necesas diri, ke Ŝujo estas ne tre granda (la tria en la Ivanova provinco laŭ la kvanto de la loĝantaro) urbo, havanta la antikvan historion. Ĝi estas konata de la XVI-a jarcento, kiam ĝi estis riĉa urbeto ĉe la kruciĝo de komercaj vojoj. Siatempe Ŝujo estis eĉ pli grava ol Ivanovo, ĉar ne ĝi apartenis al la Ivanova provinco, sed Ivanovo-Voznesenko estis en la konsisto de Ŝuja distrikto. Nomo de la urbo estas ligita kun Ŝujaj princoj, kiuj posedis la urbon dum ĉirkaŭ 200 jaroj.



Nia ekskurso en la urbo komenciĝis de la Ŝuja sonorilturo, kiu estas simbolo de la urbo. Antaŭ ĝi staras la monumento al la pafmortigitaj en la 1922-a jaro pro la kredo ortodoksaj pastroj. Kun sia alteco de 106 metroj la kampanilo estas unu el la plej altaj en Rusio. Nia grupo ricevis permeson ascendi la sonorilejon, kaj multaj esperantistoj volonte faris tion, uzante la enan ŝtuparon. Kelkaj minutoj de supreniĝo kaj jen, Ŝujo, troviĝas kiel sur la manplato – pitoreska amasiĝo de la tegmentoj de la domoj, dronantaj en verdaĵoj. Je kelkaj paŝoj de la sonorilturo estas Resurekta katedralo, kiun ni ankaŭ vizitis. Plu ni iris promeni en la centron de la urbo. Ŝujo estas unu el nemultaj urboj, kiuj konservis centre sian unuecan historian planon. Ĝiaj konstruaĵoj estas malnovaj, duetaĝaj, interesaj domoj, kvankam ankoraŭ ne ĉie restaŭritaj. Ĉar la urbo estas antikva, negocista, en ĝia centro estas komercaj domvicoj. Antaŭ nelonge finiĝis la restaŭrado de ankoraŭ unu unika arkitektura monumento – Ĉaregaj Pesiloj – similaj estas plu nenie.

Promenante ni eliris al la urba parko, antaŭ kiu sur la Lenina placo ni

trovis ankaŭ la monumenton al la aveto Lenin mem. Iom trairinte plu, ni ekvidis belan kaj bone flegitan konstruaĵon – eksan urbodomon, kie nun troviĝas regionografia kaj samtempe literatura muzeo de Konstanteno Balmonto. Ekskursi ĉi tie ni venos aparte, en alia tago. Ni povis vidi ankaŭ la konstruaĵon de malnova urba malsanulejo “Kiseljovskaja”, konstruita en la 1841-a jaro de negocisto Kiseljov. Nun staras tiu kompatinda merita “malnovulo” kaj malrapide detruigatas pro tempo kaj pro indiferento de ŝtataj funkciuloj. Ne tre malproksime de tiu ĉi loko antaŭe situis Ŝuja kremla, kiu, bedaŭrinde, ne konserviĝis ĝis nun.

Ankoraŭ unu vera arkitektura verko de la XIX-a jarcento, pri kiu Ŝujo povas fieri, estas la duetaĝa domo de fabrikanto Pavlov aŭ la Pavlova palaco, kiel oni nomas ĝin ĉi tie. Ĝi estas vere bela palaco, kun multaj marmoraj statuoj, bela ĉefenireja ŝtuparo, kun riĉe orumitaj mulditaj dekoracioj, kun speguloj el venecia vitro. Ni plezure ĝuis ĝian belecon!

Entute la urbo lasis tre agrablan impreson en niaj koroj. Fine de la ekskurso ni vizitis specialan vendejon de la fabriko “Ŝuja vodko” kaj povis elekti kaj aĉeti tie memoraĵojn el Ŝujo: jam gustumitajn berajn likvorojn kaj la faman balzamon. Tute kontentaj ni revenis nian bazejon, kie post la tagmanĝo nin atendis laŭprogramaj aranĝoj de RET. Mi denove vizitis la kurson de V. Opletajev, kaj poste iris aŭskulti tre interesan prelegon de Valentin Melnikov pri Esperanto- poezio, okazinta enkadre de la Somera Universitato.

Vespero de tiu longa kaj enhaviĉa tago finiĝis ankaŭ bele. Ni ĉiuj ĝuis lignofajron surborde de la rivero Teza. Estis tre agrable sidi ĉe la fajro, enspiri odorojn de arboj, freŝan aeron, kontempli la briletantan apude riveron kaj rapidan ŝanĝiĝon de ĉielkoloroj dum la sunsubiro, nenien rapidi, kunkanti akompane de gitaro, mallaŭte babili inter si kaj ion rememori...

La kvara tago de RET. La instruista seminario. Koncerto de M. Povorin kaj V. Jareŝko

Dum mia restado en RET, mi ĉiutage penis vekigi pli frue por se ne naĝi en la rivero, kiel tion brave kaj enviinde faris ĉiutage Evelina Sokolova, do almenaŭ promeni ĝis la matenmanĝo. Se konsideri, ke ni malfrue enlitiĝis kaj ke mi ĝenerale ŝatas longe dormi matene, tio estis ne tre facila por mi:) Nu, la kvaran de julio mi sukcesis ellitiĝi sufiĉe frue, kaj senbedaŭre lasinte mian lignan dometon, eliris eksteren por saluti la sunon. Sed mi salutis ankaŭ frumatene alveturintan Irina-n Gonĉarova, kiun mi surprize ekvidis antaŭ mi surbenke (ŝi partoprenis ĉi -jaraĵon RET-on nur dum tri tagoj). Certe okazis la varma renkontiĝo kaj vigla babilado de la amikinoj, sekve ankaŭ tiu ĉi tago komenciĝis agrable kaj eblas aldoni nun, ke ĝi ĝenerale pasis pli malstreĉe ol la antaŭa. Ĝis la tagmanĝo mi, kiel kutime, pasigis la tempon en la kurso de komencintoj, ne nur observante la lecionon, sed ankaŭ aktive partoprenante en diversaj allogaj lingvaj ludoj, kiujn lerte uzis la instruisto por plifirmigi la sciojn, akiritajn de la lernantoj dum la leciono. La leciono pasis kiel ĉiam tre vigle kaj bonhumore.

Post la leciono en la kurso komenciĝis la Instruista Seminario, kiun ankaŭ gvidis Vladimir Opletajev, jam kiel estrarano de REU pri instruado. Estis tre interese aŭskulti lian prelegon kaj vidi la prezentaĵon pri la stato de la instruado de Esperanto en Rusio kun gravaj

konkludoj kaj pripensendaj problemoj. La seminario daŭris ankaŭ post la tagmanĝo kaj ĝia dua parto komenciĝis de la agrabla novaĵo pri tio, ke la Estraro de REU proklamis Irina-n Gonĉarova “Eminenta instruisto de Esperanto en Rusio en la lernojaro 2017 – 2018”, pri kio mi sincere ĝojis. Poste Tatjana Loskutova rakontis pri sia multjara sperto instrui Esperanton eksterlande kaj prezentis sian kurson surbaze de la legolibro por komencantoj “Mamutido Miĉjo” de Mikaelo Bronŝtejn. Finiĝis la seminario per libera interŝanĝo de opinioj pri atingitaj rezultoj, pri ekzistantaj problemoj en la instruado de Esperanto en Rusio, pri tio, kiel eblas aktivigi kaj lertigi instruistojn de la lingvo.

Vespere de la kvara tago estis bela koncerto de la kantista dueto Mikaelo Povorin kaj Valerija Jareŝko, kiu kunvenigis ĉiujn diversagaĵajn kaj diversinteresaĵajn partoprenintojn de RET en la kamena salono de la ĉefa bona domo. Antaŭ la koncerto okazis la solena enmanigo de la honorfolio kaj premia donaco de la REU _ Estraro al Irina Gonĉarova kiel al ĉi-jara eminenta instruisto de Esperanto en Rusio, kion ĉiuj geamikoj aprobis per laŭtaj aplaŭdoj. Kaj plu dum la tuta vespero regis la reĝina moŝto Muziko kaj sonis tre belaj kantoj. Mi ŝatas multajn kantojn de Mikaelo Povorin, kiu verkas bonegajn tekstojn kaj muzikon al ili, sed mi devas diri, ke ĉi-foje, la unuan fojon elpaŝante duete kun Valerija Jareŝko, li ĉarmis la publikon de RET. Valerija estas esperantistino kaj profesia muzikistino el Sankt-Peterburgo, ŝi posedas belegan, melodian fajnan voĉon, kiu vere plibeligis la programon de la koncerto! Mi tre ĝojas, ke dum RET-2018 mi povis pli proksime konatiĝi kaj amikiĝi kun Valerija! Interŝanĝinte impresojn pri la koncerto kun la geamikoj, mi devis iri pli frue dormi tiuvespere, ja morgaŭ nin atendis la tuttaga ekskurso laŭ la Balmontaj lokoj kaj estis planita frua elveturo direkte al Ŝujo.



koncerto okazis la solena enmanigo de la honorfolio kaj premia donaco de la REU _ Estraro al Irina Gonĉarova kiel al ĉi-jara eminenta instruisto de Esperanto en Rusio, kion ĉiuj geamikoj aprobis per laŭtaj aplaŭdoj. Kaj plu dum la tuta vespero regis la reĝina moŝto Muziko kaj sonis tre belaj kantoj. Mi ŝatas multajn kantojn de Mikaelo Povorin, kiu verkas bonegajn tekstojn kaj muzikon al ili, sed mi devas diri, ke ĉi-foje, la unuan fojon elpaŝante duete kun Valerija Jareŝko, li ĉarmis la publikon de RET. Valerija estas esperantistino kaj profesia muzikistino el Sankt-Peterburgo, ŝi posedas belegan, melodian fajnan voĉon, kiu vere plibeligis la programon de la koncerto! Mi tre ĝojas, ke dum RET-2018 mi povis pli proksime konatiĝi kaj amikiĝi kun Valerija! Interŝanĝinte impresojn pri la koncerto kun la geamikoj, mi devis iri pli frue dormi tiuvespere, ja morgaŭ nin atendis la tuttaga ekskurso laŭ la Balmontaj lokoj kaj estis planita frua elveturo direkte al Ŝujo.

La kvina tago de RET. La tuttaga ekskurso, dediĉita al Konstanteno Balmonto – arĝentepoka poeto

Post la matenmanĝo nia buso ekveturis al la muzeo de K. Balmonto en Ŝujo. Duonhora veturado kaj ni estas jam apud ĝi. La regionografia kaj samtempe literatura muzeo de K. Balmonto troviĝas en la historia konstruaĵo, kiu iam estis la urbodomo. Nun tio estas bela verdkolora konstruaĵo en pseŭdorusa stilo, kvazaŭ pripentrita bojara domo el rusa fabelo, kiu vole-nevole altiras la atenton per siaj belaj tabuloj de la fenestraj kadroj, per la riĉa dekoracio kaj per la dukolora pavilona tegmento. Tio estas la unua en Rusio muzeo, dediĉita al la vivo kaj kreado de la poeto de arĝenta epoko Konstanteno Balmonto. Enirinte en la muzeon, ni ekvidis belan ĉefenirejan ŝtuparon, kiu kvazaŭ invitis supreniĝi kaj konatiĝi kun la muzea kolekto. Supre de la ŝtuparo baldaŭ aperis la scienca kunlaboranto de la muzeo kaj nia ĉefa ekskursgvidanto de tiu tago Svetlana Vinokurova, en tre bela robo, konvena al tiu epoko, en kiu vivis la poeto. Komence ni konatiĝis kun la regionografia kolekto de la muzeo, kiu okupas ĝian unuan etaĝon kaj estas prezentita

per eksponaĵoj pri la naturo de Ŝuja provinco, per historiaj dokumentoj, maketo de Ŝuja kremlo, per faraĵoj de lokaj metiistoj, la porcelana kolekto k.a. La dua etaĝo estas dediĉita al la vivo kaj kreado de la fama poeto-symbolisto. Supreniĝante laŭ la ŝtuparo ni vidis la portreton de K. Balmonto kun liaj vortoj: “Por mi Ŝujo estas ĉiam dezirata” (“Мне всегда желанна Шуя”). En la halo estas prezentitaj liaj dumvivaj eldonaĵoj, dokumentoj kaj fotoj, liaj personaj aĵoj kaj liaj aŭtografoj. Inter la eksponaĵoj – la libro “La kabano de la onklo Tom” kun la subskribo de la poeto kaj skribilo, kiun K. Balmont donacis al sia edzino Jekaterina Aleksejevna. Fondaĵo de K. Balmont estis kreita en la 1968-a jaro kiel iniciato de publikaj aktivuloj kaj ĝian bazon konsistigas donacoj de ŝujanoj. En la muzeo ofte okazas kreaĵ vesperoj kaj renkontiĝoj, en kiuj jam plurfoje partoprenis alvenintaj al sia etpatrujo la prafiloj de la poeto.


K. Balmonto naskiĝis en la vilaĝo Gumniŝĉi, kie estis la bieno de liaj gepatroj kaj kie li pasigis siajn infanajn jarojn. La vilaĝo situas proksime de la urbo, kaj ni vizitis ankaŭ ĝin, fotiĝis apud la monumento al la poeto, promenis laŭ la tilia aleo de la parko, kie li ŝatis vagi. Laŭvoje ni vizitis ankaŭ la vilaĝon Jakimanna, kie estas la tombo de la gepatroj kaj de la frato de la poeto, kaj kie la loka pastro Manuil servis funebran litanion. En Ŝujo K. Balmonto vivis de 1876 ĝis 1884. Tiuj jaroj trafis liajn adoleskan aĝon kaj fruan junecon. Siajn memorindajn impresojn de tiu tempo la poeto esprimis en la versaĵo “Duondormo” (“Drjoma”). Konservigis la domo, kie li loĝis, kaj nia grupo povis viziti ĝin kaj fotiĝi ankaŭ antaŭ ĝi. Krome ni havis grandan interesan ekskurson en la urba lernejo je la nomo de K. D. Balmonto. Antaŭe tio estis vira klasika gimnazio, kies lernanto estis la estonta fama poeto. Ni povis vidi tie la lernejan muzeon, dediĉitan al li kaj eĉ renkontiĝi kun kelkaj nunaj lernantoj, kiuj deklamis por ni poemojn de K. Balmonto.

La pinto de nia tiutaga ekskursiva programo estis literatur-muzika vespero memore al K. Balmonto, kiun partoprenis lokaj poeziŝatantoj kaj nia esperantista grupo. Ĝi okazis en la muzeo, kaj ĝian programon reĝisoris kaj gvidis nia ekskursgvidanto S. Vinokurova. Nikolao Gudskov rakontis pri la redaktado de la poemkolekto de Balmonto “Mi venis al la mondo por vidi sunon”,

sonis belegaj verkoj de la poeto en la rusa kaj en Esperanto, kaj foje eĉ kante. Tiel bele finiĝis nia longa kaj emociplena ekskurso! Estis vere tre klerige kaj interese trafi en tiujn lokojn, kiuj gardas la kulture heredaĵon de la fama poeto-symbolisto, profundiĝi en la mondon de lia poezio kaj ricevi veran plezuron de la rakonto de nia ĉiĉeronino, kiu estas enamiĝinta en sian profesion kaj en sian urbon.

Ni revenis al la bazejo nur al pli malfrua ol kutime vespermanĝo, post kiu okazis ankoraŭ luda vespera programo, sed mi jam ne povis partopreni ĝin kaj pro la laco kaj pro la nedeziro miksi miajn bonajn tiutagajn impresojn kun la aliaj.

P. S. Dum mi skribis tiun ĉi raporton, mi ligiĝis al la grupo en VK “Музей К.Бальмонта (краеведческий) г. Шуя” kaj tralegis tie noticon pri la vizito de nia esperantista grupo al la muzeo la 6-n de julio ĉi-jare kaj nia partopreno tie en la literatur-muzika vespero memore al K. Balmonto. Kun intereso mi tralegis ankaŭ multajn aliajn materialojn, rilatajn al la poeto, inter kiuj estis la informo de la 15-a de julio 2018 pri la morto de la filino de la poeto Svellana Konstantinovna Ŝejz (1925 – 2018). Ŝi loĝis en Usono kaj estis filologo, multe kunlaboris kun la muzeo kaj transdonis donace al ĝi multajn valorajn eksponaĵojn, litigitajn kun la poeto. Ŝujon, naskiĝlokon de sia patro, ŝi vizitis lastfoje decembre de la 2009-a jaro.



La sesa tago de RET. Interpretista konkurso. Poezia vespero

La tagoj de RET nerimarkeble kaj rapide degelis. Kaj jen, estis jam la sesa tago, la unua parto de kiu pasis en la kurso por komencintoj. Mi ankoraŭ ne skribis, ke dum ĝi mi konatiĝis kun tre simpatia juna geedza paro de esperantistoj el la urbo Taganrogo: Valentina kaj Eŭgeno Stulin, kiuj komencis lerni Esperanton memstare. Ilia geedziĝifesto okazis maje, kaj tiu ĉi RET estis por ili la unua granda Esperanto-renkontiĝo, kiun ili partoprenis kune. Ambaŭ ili estas tre viglaj, aktivaj, scivolemaj kaj lernemaj, kaj kun granda entuziasmo ili daŭrigis lerni la lingvon en la A2-nivela kurso dum RET. Observante, kiel kreskis ilia lingva nivelo de leciono al leciono, mi vidis, ke ili jam ne timas paroli ĝin, kaj sincere ĝojis pro la duopo.

Post la tagmanĝo okazis interpretista konkurso, kiun preparis kaj gvidis Mikaelo Povorin kaj Larisa Ŝapoŝnikova. Ili elektis kaj proponis por la konkurso tre interesajn kaj humurplenajn tekstojn, kiuj multe amuzis la ĉeestintan publikon. La interpretista konkurso antaŭvidis la partoprenantojn de du niveloj: komencantojn kaj spertajn uzantojn de la lingvo. La unuan ekkuraĝis partopreni kelkaj kursanoj de la A2-nivela kurso de RET, kio min ĝojigis. Mi nur tre bedaŭris, ke la disponigita por ili teksto estis tro komplika kaj ne konvenis al la nivelo de ilia lingvoposedo, kaj tial ili ĉiuj estis konsternitaj pro la puŝiĝo kun lavango de nekonataj vortoj kaj specialaj terminoj. Mi esperas, ke tiu ĉi unua sperto apliki siajn lingvosociojn praktike, en interpretado, ne disrevigis niajn komencintojn, kaj ili ne perdis la deziron plu perfektigi en la lingvo.

En la grupo de spertaj uzantoj elprovis siajn fortojn multaj esperantistoj- spertuloj, kaj ili estis tre eltrovemaj en la interpretado. Estis interese al mi aŭskulti diversajn versiojn kaj pensi, kiun el ili mi mem preferus uzi. Fine de la konkurso la ĵurio nomis gajnintojn: inter la komencantoj tio estis Eŭgeno Stulin kaj inter la spertuloj – Valentin Melnikov.

Tiutage okazis ankaŭ la poezia vespero, kiun reĝisoris kaj gvidis mi mem. Estas agrable nun al mi rememori ĝin, ĉar, ŝajne, ĝi sukcesis. Mi komencis prepari la programon antaŭlonge, kreis enkapen ĝian scenaron, kie kelkaj apartaj temoj kiel poezio, amikeco, amo, somera naturo kaj feliĉaj vivmomentoj estis interligitaj pere de tiel nomataj “pontetoj” (muziko, kantoj). Zorge elektinte la poeziaĵojn al ĉiu el la partoj, mi kompilis la tekstojn. Dum kelkaj tagoj de RET mi havis eblecon ekkoni ĉiujn retanojn kaj decidi al kiu kiun verkon proponi voĉlegi dum la poezivespero. Svetlana Smetanina kaj Vladimir Opletajev helpis al mi anticipi prepari la salonon, kie okazis la aranĝo, kaj krei romantikan kaj animecan atmosferon, kiam ĉiuj sidis ĉe tabletoj, kovritaj per belaj tablutukoj kaj kun kandeloj en la kandelingoj, kun pokaloj de malpeza vino kaj bombonoj, aŭdeblis mallaŭta agrabla muziko kaj aperis videoj surekrane. Estis voĉlegataj diversaj originalaj kaj tradukitaj, klasikaj kaj modernaj poeziaj verkoj, voĉoj de geamikoj sonis jen kortuŝe kaj tenere, jen ludeme kaj humurplene, foje vive kantis niaj ŝatataj ĉeestantaj muzikistoj: M. Povorin, V. Jareŝko, E. Sokolova, A. Osokin. Estas tre ĝojiga la fakto, ke mi sukcesis engaĝi preskaŭ ĉiujn partoprenantojn de RET en la programon de la vespero, inkluzive la junan duopon Valentina kaj Eŭgeno Stulin, kiuj bonege voĉlegis belajn poemojn. Nun mi ŝatus kore danki karajn geamikojn, kiuj kontribuis por la aranĝo! Mi esperas, ke vi ĉiuj, same kiel mi mem, perceptis tiuvespere la ĉeeston de Inspiro en la salono kaj ŝatis tiun mergiĝon en la mondon de la Esperanto-poezio.

La sepa tago de RET. Ekskurso al Paleĥ. Vespera koncerto de la muzik-bando "Ekvinokso"

La 7-n de julio ni denove frumatene lasis la bazejon por veturi ekskursi en la fabela Paleĥ. Paleĥ estas urbeto de Ivanova provinco, kiu apartenas al la urboj de la Ora Ringo de Rusio. La urbon trafluas la rivero kun la bela nomo Paleŝka, kaj loĝantoj de la urbo nomas sin paleŝanoj. Paleĥ estas la hejmlando de fabela fajrobirdo, kiu pavas sur la blazono kaj flago de la urbo, pentrita en la tradicia por la paleĥa laka miniaturisto stilo: orkolore sur la nigra fono. Ĝusta dato de fondiĝo de la urbo ne estas konata, oni opinias, ke ĝi ekzistis jam antaŭ la XV-a jarcento.



Nia ekskurso komenciĝis de la Krucaltiga katedralo. La templo estas konstruita en la XVIII-a jarcento je la mono de ĝia paroĥonaro, ĝia arkitekto estis Jegor Dubov. Bela kvinkupola preĝejo ligiĝas per preĝeja perono kun la kampanilo en la formo simila al pavilono. Internaj muroj de la preĝejo estas riĉe kovritaj per freskoj de paleĥaj majstroj. La sesetaĝa ikonostazo estas ornamita en rokoko-stilo kaj kovrita per ortavolo. En la sovetia tempo, en la epoko de religipersekuto, la templo estis transdonita al la Ŝtata muzeo de paleĥa arto, kaj nur tio helpis savi la katedralon de la detruo.

Post tio ni vizitis la Ŝtatan muzeon de paleĥa pentroarto, kiu estis fondita en la 1934-a jaro, kaj en ĝia organizado aktive partoprenis la verkisto M. Gorĵkij, kiu mem neniam estis en Paleĥ. La muzea komplekso konsistas el pluraj partoj, el kiuj laste malfermita estis la muzeo de ikonoj. Multaj scias la urbon antaŭ ĉio kiel centron de fama paleĥa laka miniaturisto. Sed pri laka miniaturisto oni komencis

okupiĝi ĉi tie nur post la revolucio de la 17-a jaro, kiam ne eblis plu okupiĝi pri ikonopentrado, pri kiu deantikve estis fama la urbo. En la ekspozicio de la muzeo de ikonoj multas vere antikvaj paleĥaj ikonoj. Tiu metio distingiĝis ĉi tie per aparta fajneco kaj uzado de ora farbo por vestpentrado de sanktuloj. Kiam la ikonopentrado iĝis ne aktuala, plej bonaj pentristoj de Paleĥ kreis fenomenon de paleĥa laka miniaturisto, kiu famiĝis en la tuta mondo. Ekspozicio de la muzeo de laka miniaturisto komenciĝas de vitrinoj, kiuj rakontas pri materialoj, uzataj de paleĥaj pentristoj, pri teknologio de farado de artaĵoj el papermaĉaĵo. En sekva salono estas prezentita kreado de la fondintoj de paleĥa laka miniaturisto: I. Golikov kaj aliaj. Kaj kompreneble multas belaj eksponaĵoj de laka miniaturisto mem. Sur la diversaj artaĵoj el muldokartono pentristoj sur la nigra fono pentris kiel bildojn el famaj rusaj fabeloj, tiel ankaŭ diversajn historiajn momentojn.

Al la muzea galerio apartenas ankaŭ la domo-muzeo de I. Golikov, muzeo-skulptejo de N. Didikin kaj domo _ muzeo de P. Korin, kaj ni vizitis ĉiujn tri. I. I. Golikov estis fondinto de paleĥa laka miniaturisto kaj unu el la plej talentaj kaj elstaraj lokaj pentristoj. Lia domo-muzeo funkcias ekde 1968. En unu el ĝiaj ĉambroj estas prezentitaj nemultaj personaj aĵoj de la pentristo kiel lia skribotablo, bretaro kun libroj, liaj lito kaj seĝoj; en alia ĉambro troviĝas materialoj, kiuj rakontas pri la lanĉo kaj evoluigo de paleĥa pentroarto. Ĉi tie eblas vidi ankaŭ unikajn fotojn de la antikva Paleĥ. Inter eksponaĵoj de la muzeo estas rara, eldonita en la 1934-a jaro, libro “Kanto pri la militiro de Igor” (“Slovo o polku Igoreve”) kun la ilustraĵoj de I. Golikov.

Al mi tre plaĉis domo-skulptejo de elstara paleĥa skulptisto N. Didikin. En tiu ĉi malgranda metiejo estis kreitaj skulptaĵoj de Andrej Rubljov, A. Puŝkin, L. Tolstoj, A. Blok, D. Bajron, S. Raĥmaninov kaj multaj aliaj famaj personoj. Ekspozicio de la muzeo konsistas el pli ol 100 laboraĵoj de la skulptisto, kiujn li mem heredigis al la paleĥa muzeo. En la teritorio, kiu ĉirkaŭas la metiejon, situas pomuja ĝardeno kaj ĉi tie ankoraŭ kreskas abioj kaj tilioj, kiujn plantis mem Didikin. En la galerio ĉiujare okazas festivalo “Jabloĉnij Spas” (“Festo de la Transfiguriĝo de nia savanto Jesuo Kristo”), kiun partoprenas multaj kulturagantoj.



Kaj certe maleblas, estante en Paleĥ, ne viziti domon-muzeon de la vaste konata en Sovetunio kaj Rusio pentristo Pavel Korin. Tien ni devis piediri eble dum kvarono da horo. Ŝajnas nelonge... sed dum ni iris tien, nin "kovris" subite komenciĝinta fulmotondra pluvego. Niaj ombreloj restis en la buso, tial la muzeon ni atingis jam malsekaj kaj tre ĝojis kaŝi nin tie de la forta pluvo. La domo estas la plej malnova en Paleĥ, konstruita en la 1860-aj jaroj. P. Korin zorge konservis tiun antikvan domon de sia avino, la meblaron kaj aĵojn, kiujn uzis liaj praŭloj kaj heredigis ĉion, kune kun la unika ikonokolekto, al sia kara urbo. La muzeo estis fondita en la domo post pli ol 100 jaroj. Verda ĉambro de la domo estas dediĉita al ikonpentra arto. En la pentrejo troviĝas pentrostablo, objektoj, kiuj estis bezonataj al la pentisto dum lia laboro, kaj ankaŭ liaj etudoj. Tria halo prezentas monumentan pentroarton kaj skizojn de P. Korin por dekoracioj de metroostacioj en Moskvo.

En miaj rememoroj pri ĉiuj niaj ekskursoj Paleĥ restas kiel pitoreska makulo, koagulaĵo de absoluta arto. Eĉ ni ĉiuj, kiuj venis ĉi tien por "kure-kure" rigardi ĉion, povis percepti la ĉarmon de malgranda urbeto, kies tuta historio estas ligita kun la pentroarto. Kaj valora atmosfero de la mirinda pentrista urbo emigis nin malrapidigi la paŝojn, iom resti ĉi tie kaj daŭrigi la momentojn de la vizado kaj ĝuado. Sed la buso jam atendis nin kaj, aĉetinte malgrandajn memoraĵojn en la butikoj, ni veturis reen al nia bazejo.

Post la tagmanĝo mi vizitis la prezentaĵojn, kiuj estis speciale preparitaj por la lernatoj de la A2-nivela kurso, laŭ temoj de la lecionoj, kiujn ili havis. Vespere okazis ankoraŭ unu agrabla programo – la koncerto de muzik-bando "Ekvinokso" (en la konsisto: Andrej Obrezkov, Valerij Vorobjov, Aleksandr Osokin, Evelina Sokolova). Mi tre ŝatas ĉi tiun grupon kaj delonge atendis ilian koncerton. Jam la duan someron mi vidas dum RET-oj, kiel diligente preparas la muzikistoj de la grupo sian programon, kiom multe ili provludas, kaj tio elvokas mian grandan estimon al ilia krea laboro. "Ekvinokso" ne disrevigis min ankaŭ ĉi-foje! Bele sonis jam konataj al mi kaj ŝatataj de mi kantoj, sed ĝojigis ankaŭ pluraj novaj kantoj de la grupo. Mi dankas la muzikistojn, kiuj donacis al mi tiuvespere tiom da plezuro! La sola bedaŭro, kiu aperis, estis pri tio, ke ĉio (la koncerto) tre rapide finiĝis.

En plena eŭforio de agrablaj impresoj kaj pozitivaj emocioj de la tuta tago mi iris dormi kaj longe ne povis endormiĝi.)

La oka tago de RET. Ekskurso al la sapmuzeo en Ŝujo. Adiaŭa vespero

Tio estis antaŭlasta tago de RET. Post la matenmanĝo okazis la lasta leciono en la kurso por komencintoj, dum kiu kursanoj sukcese trapasis la testadon kaj post ĝi partoprenis diversajn lingvajn ludojn kaj plenumis amuzajn taskojn. Al mi plaĉis tiu kun zamenhofaj proverboj, duonigitaj kaj presitaj sur apartaj kartetoj. Ĉiu teamo el du homoj ricevis sian stakon de la kartetoj kaj devis trovi plenajn versiojn de la proverboj, traduki ilin kaj eble eĉ proponi la analogojn en la rusa.

De lingvaj ludoj por la kursanoj mi transiris al la tabloludoj, kiujn kunportis kaj organizis ĉe alia tablo Evelina Sokolova. Do, mi plezure havis tiun tempon por ludoj!)

Post la tagmanĝo okazis vizito al la sapmuzeo en Ŝujo. Ĝi situas en ne tre granda konstruaĵo, kiu aspektas kiel kutima loĝdomo. La muzeo aperis en Ŝujo antaŭnelonge, fondis ĝin ordinaraĵoj lokaj entuziasmoj, kiuj mem gvidas la ekskursojn, kaj la muzeo funkcias dank' al la penoj de ĝiaj fondintoj. Oni rakontis al ni ĉi tie pri la historio de saptoproduktado. En Ŝujo saporfabriko ekzistis ankoraŭ en la malproksima XVII-a jarcento, kaj iliaj produktaĵoj estis konataj en la tuta Rusio. Por la produktado de sapo estis bezonata cindro, graso kaj por plibonigi ĝiajn ecojn oni ankoraŭ uzis linoleon. Sapon oni kuiris en specialaj kaldronoj. En la 1781-a jaro laŭ la ukazo de Jekaterina la Dua sur la blazono de la urbo aperis peco de sapo. Kaj nun sur la flago kaj blazono de Ŝujo sur ruĝa kampo estas prezentita sappeco. Nuntempe tiu ĉi antikva metio renaskiĝas ĉi tie.

En la unua etaĝo de la muzeo estas iom prezentita la historio de la dua malnova metio de Ŝujo – produktado de indieno. Ĉi tie staras rulcilindroj, per kiuj oni presas iujn ornamdesegnojn, kaj estas multaj ekzempleroj de ŝtofoj. Oni okazigis por ni metiejon pri saptoproduktado, kaj ĉiu el ni provis fari malgrandan peceton de la sapo kaj iel, ne tre komplike, per ĉiziletoj tajli ĝin. Ni ankaŭ rigardis malgrandan saptoprodukton en la montrakesto, fotiĝis por la memoro, elektis kaj aĉetis kiel memoraĵon sappecon, kaj forlasis tiun animecan muzeeton.

Post la vespermanĝo okazis la adiaŭa vespero, por kies programo kontribuis ĉiu deziranto: ĉu kantante, ĉu deklamante, ĉu muzikludante aŭ eĉ ŝercante. La REU – Estraro enmanigis dankfoliojn al ĉiuj aktivaj partoprenintoj kaj iom informis pri la statistiko de RET-2018. Ĉion kronis la agrabla amika festeno, kun speciale preparitaj bongustegaj ŝaŝlikoj kaj al multaj plaĉaj ŝujaj beraj likvoroj. Fine ni kunkantis en amika rondo kaj eĉ dezirantoj povis danci dum la diskoteko, organizita de Vadim Solovjov.

La 9-n de julio komenciĝis disveturado de la partoprenantoj, kaj jam frumatene la bazejon forlasis kelkaj esperantistoj. Post la matenmanĝo restis iom da tempo por lastfoje promeni en la apuda arbaro, malsupreniĝi al la rivero kaj iom stari, ĝuante la ĉarmon de vidaĵoj kaj ĉirkaŭanta harmonio, submetante la vizaĝon al la brilanta suno, nelonge daŭrigante la agrablegajn momentojn de la kontemplado kaj la percepton de malstreĉiĝeco. Tagmeze okazis la lasta ero de la programo: solena fermo de RET-2018 kaj estis faritaj kelkaj anoncoj pri diversaj estontaj Esperanto-eventoj.

Post la tagmanĝo ankaŭ mi ĝisrevidis kaj forveturis el la bazejo. Adiaŭ ĉarma loko! Adiaŭ bela RET- 2018! Mi sincere dankas ĉiujn REU-estrananojn, sen kiuj tiu ĉi evento ne okazus kaj dankas ĉiujn geamikojn, kiuj aktive ĝin partoprenis!

Raja Kudrjavceva
<https://ural-sib.org/eo>

IOM PRI RET-2018

La 4-6-an de julio mi partoprenis RET-2018. La tuta aranĝo daŭras 01-09.07, sed mi, bedaŭrinde, povis ĉeesti nur dum 3 tagoj.

Krom mi el MASianoj estis nur Norden kaj Britta, por la sabato-dimanĉo intencis veni Lusja, celanta al la koncerto de "Ekvinokso" – kaj mi esperas, ke ŝi jam estas tie. Ja ju pli da homoj ĝuos la aranĝon, des malpli da neĉeestintoj mi kompatos.)



La evento estas bonega, laŭ mi. Svetlana Smetanina estas elstara majstro de organizado de amasaj aranĝoj, inter cetera _ de ekskursoj, kiuj ĉiam abundegas en ŝia programo. Ankaŭ ĉifoje estas multaj plenŝtopitaj ekskursoj, sed al mi bonŝancis ĉeesti nur unu, dediĉitan al la elstara rusa poeto-simbolisto Konstanteno Balmonto. Ni estis en lia muzeo, en la gimnazio, kie li lernis (ankaŭ mem Svetlana lernis tie!), en lia naskiĝloko Gumniŝĉi kaj ankoraŭ ie-ie-ie... La programon kronis belega poezia vespero en la muzeo de Balmont, kie lokanoj kaj esperantistoj deklamis poemojn de la poeto. Bonega kleriga kaj emociplena tago!

Pri la labora programo de RET okupiĝas Nikolao Gudskov. Ĝi estas por mi interesa, kvankam ne respondis al la anoncita temo de tiu ĉi RET

("Generacioj de Esperanto-movado")¹. Anticipe estis interkonsento kun mi ke mi venu por unu tago – la 4-an de julio – por okazigi ion laŭ la temo, sed subite evidentiĝis, ke oni ne konsideris miajn kontribuojn por la programo – kio estis por mi tre malagrabla: se mi scius, mi tute ne venus: mi aperis pro miaj devoj plenumi la promeson, sed ne por plezurigi min per la partopreno. Tamen tiu neglekto okazis mia bonŝanco.) Estis tre bone, vere.

Do, okazis Somera Universitato – mi trafis prelegojn de Tatjana Loskutova pri riĉega historio de Esperanta movado en la regiono kaj de Valentin Melnikov pri Esperanta poezio. Speciale grava por mi estis diskuto pri la libro de Aleksandro Piperski "Lingvokonstuaĵo: de Esperanto ĝis dotrakia" (dankon al Norden pro protokolado!). Dum la Instruista seminario, gvidata de Vladimir Opletajev, Tatjana Loskutova prezentis sian lernolibron laŭ la romaneto de Mikaelo Bronŝtejn "Mamutido Miĉjo" kaj rakontis pri sia sperto de E-instruado eksterlande.

Oh – mi preskaŭ forgesis! Mi alportis du skizojn de miaj novaj prezentaĵoj, preparataj por ILEI-Kongreso en Madrido, kaj mi sukcesis elpaŝi kun ili. Estis utile: la prezentaĵon "Lingva Festivalo: lingva konsciigilo sub verda standardo" rezulte mi dum 5 horoj hieraŭ poluris. La dua polurado _ pri la prezentaĵo "Esperanta Poŝtkruciĝo: vojetoj en kaj al Esperantujo" _ atendas min baldaŭ...

Ĉiam dum REToj formiĝas tre amika, anima etoso, speciale ĉi-foje: estis ĉ. 20 homoj nur, kaj preskaŭ ĉiuj _ tre bone inter si konataj dum pluraj jardekoj. Specialan ĉarmon aldonis la aranĝita de Raja Kudrjavceva Poezia Vespero – organizita kun perfekta preparemo de Raja, sed kun iomaj trajtoj de libera APERA hejmeco. Belega aranĝo, kiun kontribuis preskaŭ ĉiuj, ankaŭ la du agrablaj gejunuloj-novuloj el Taganrogo.

Kun granda bedaŭro mi forveturis profundan nokton la 6-an de julio, akompanata ĝis la taksio de kelkaj karaj geamikoj...

Mi certas, ke la restaj tagoj de RET estas same bonegaj.

Dankon al la organizantoj kaj karaj ĉeestantoj!

Mirina / Irina Gonĉarova

Instruista seminario de RET-2018

La 4an kaj la 6an de julio 2018 okazis sesioj de la Instruista seminario, kies enhavo ĉi-foje esti pli inform-diskuta ol celanta iun konkretan metodikan temon aŭ instruteknologion. Seminariaj okupoj celas per praktikaj taskoj kaj diskutoj solvi ekzistantajn problemojn, vidigi novajn ideojn, okazigi spertinterŝanĝojn, reflekti atingitajn rezultojn, plani vojojn al perfektigo ktp. Sekve ankaŭ la fakaj kunvenoj de instruantoj de Esperanto, kiujn dum RET respektive partoprenis 8-9 personoj, iĝis sugestiloj por pleniĝi laborplanojn de la Estraro por sekva agadjararo per interesaj ideoj kaj utilaj taskoj.

En la unua seminaria sesio la 4an de julio mi prezentis raporton pri la rezultoj de la Esperanto-instruado en Rusio en la instruperiodo "Aŭgusto 2017 – junio 2018". Mi estas kontenta, ke ĉi tiu tasko unufoje dum multaj lastaj jaroj estis pli-malpli sukcese plenumita, kaj gravas, ke ĝi kreis datumbazon por sekvaj komparoj, analizoj kaj studoj pri la instruado de Esperanto en nia lando. Mi volas danki plurajn instruemajn entuziasmulojn en Rusio por tre grava kaj malfacila instrulaboro en la pasinta lernojararo. La Estraro de REU proklamis la multjaran abnegacian kaj pasian perantigon de Esperanto Irina Gonĉarova (Odincovo) "Eminenta Esperanto-instruisto de la lernojararo 2017-2018" pro sukcesa gvidado de diversnivela Esperanto-kursoj, apogado kaj lertigo de kursfinintoj prepare al KER-ekzameno, diskonigo de propraj instruistaj spertoj. Espereble ĉi tiu iniciato iĝos tradicio, per kiu ĉiujare estos publike aprezataj homoj, kiuj faras multon por popularigo kaj disvastigo de Esperanto. Elkorajn gratulojn al Irina Gonĉarova!

Tatjana Loskutova (Ivanovo) – konata rusia instruistino de Esperanto, kiu posedas riĉajn spertojn pri la instruado de la lingvo al alilandanoj, rakontis pri sia instruista agado en la ŝtatoj de Eŭropo kaj Sud-Orienta Azio: Francio, Ĉeĥoslovakio, Vjetnamio, Kamboĝo, Indonezio, Tajlando. Tuj post RET nia kolegino intencis iri al Uzbekio, kie ŝin atendis nova tasko kaj nova defio – instrui Esperanton al loĝantoj de tiu sunriĉa centrazia lando.



¹ La diskuto pri la temo ja okazis, sed, bedaŭrinde I. Gonĉarove ĝin ne trafis.

Irina Gončarova (Odicovo) – unciatinto kaj senlaca antaŭeniganto de la projekto de poŝtkruciĝo raportis, uzante interesan komputilan prezentaĵon, pri la temo “Esperanto-Poŝtkruciĝo kiel vojeto en kaj al Esperantujo”, kies ideo estas ne nur interamikigo de diversnaciaj, sed ankaŭ aktiva kaj praktika aplikado de Esperanto en la internaciaj kontaktoj kiel fare de tute freŝbakitaj komencantoj tiel ĝis de tre spertaj lingvouzantoj.

En la dua sesia tago la 6an de julio Svetlana Smetanina (Moskvo) kompletigis la rakonton de Tatjana Loskutova per siaj rememoroj pri la instruado de Esperanto al italaj infanoj kaj plenkreskuloj sur la insulo Sicilio.

Tamen la dua kunsido estis plejparte dediĉita al la prezentado de la aŭtora kurso de Esperanto, kreita de Tatjana Loskutova surbaze de la legolibro por komencantoj “Mamutido Miĉjo” de Mikaelo Bronŝtejn. La dulingva kurso havas dume nur retan version. Januare de 2017 ĝi estis enretigita danke al Emilio Cid ĉe <http://www.gazetaro.org/mamutido/> La kurso, kiu celas la alproprigon de sufiĉa baza vortostoko kaj necesa gramatika materialo, la evoluigon de parol-kaj legokapabloj, havas entute 19 lecionojn, kies bazon konsistigas aŭtentaj tekstpartoj el la legolibro “Mamutido Miĉjo”. Ĉiuj kursgvidantoj estas invitataj apliki la kursomaterialojn aŭ la tutan lecionaron. Ekde la 9a leciono la taskoj estas formulitaj en Esperanto. La aŭtorino afable promesis prezenti sian kurson ankaŭ en “Bulteno de REU”.

En la finala parto de la Seminario estis traktata diskuttemo “Kiel aktivigi kaj lertigi Esperanto-instruistojn”. Mi prezentis tri blokojn de eblaj agadkampoj: informa, organiza kaj praktika. La informa agado temas pri aktivaj, celantaj spertinterŝanĝojn de instruistoj de Esperanto:

- informado pri aktualaj kursoj en landaj dissendolistoj kaj en „Bulteno de REU“;
- verkado kaj publikigo en „Bulteno de REU“ de intervjuoj, artikoloj, rakontoj pri sukcesa agado de Esperanto-instruistoj;
- verkado kaj publikigo de artikoloj pri instru-metodikaj temoj inkluzive de jarraportoj pri la rezultoj de la Esperanto-instruado en Rusio.

Ankaŭ la organiza agado povas alceli plurajn kunagadajn laborformojn inter instruemuloj en la lando. Iuj ideoj povas esti realigitaj nur per decido de la Konferenco de REU (Ekz. fondo de Instru-metodika komisiono de REU). Aliaj, kiuj ne tuŝas la strukturon de REU, bezonas nur apogon kaj konscian entuziasmon de apartaj aktivuloj (Ekz. reaktivigo de ILEI-sekcio en Rusio, fondo de instruista grupo en la socia reto “V kontakte”).

Estas evidente, ke aktualas ankaŭ aliaj interesaj kaj praktikaj taskoj:

- okazigo de instru-metodikaj seminarioj, metiejaj kaj trejnadaj por instruantoj de Esperanto dum grandaj landaj esperantistaj aranĝoj (Preferindas seminarioj pri konkretaj temoj kaj instruteknologioj);
- okazigo de intensaj (kelktagaj) diversnivela lingvostudadoj en diversaj regionoj de Rusio simile al la lingvotrejnadaj en Jekaterinburgo;
- okazigo de KER-specaj ekzamenoj ne nur en Moskvo sed ankaŭ en aliaj urboj kaj regionoj (Propono de Svetlana Smetanina);
- kreo kaj publikigo de bibliografio pri Esperantaj lernolibroj, verkitaj, publikigitaj, enretigitaj en Sovetunio kaj Rusio en la periodo de 1957 ĝis la nuna tempo (Propono de Irina Gončarova);
- kolektado de materialoj (artikoloj, aŭtoraj tekstoj ktp) por eventuala eldono de rusia manlibro pri la instruado de Esperanto.

Jes ja, ideoj multas... Bedaŭrinde ne ĉiam sufiĉas fortoj kaj pacienco por ilia aktualigo kaj realigo. Sed ni scias, ke multo dependas nur de ni mem. Mi dankas ĉiujn partoprenintojn de la Instruista seminario kaj sojle de la nova instrusezono mi ŝatus de la nomo de la Estraro de REU saluti ĉiujn rusiajn instruistojn kaj deziri al ĉiuj aktivaj perantoj de la internacia lingvo Esperanto multajn sukcesojn kaj talentajn lernantojn!

Vladimir Opletajev, gvidinto de la Instruista seminario

Esperanto-kurso por komencintoj dum RET-2018

En aprilo-majo de 2018 la lingve spertaj aliĝantaj partoprenantoj de RET sugestis al ĝia Organiza teamo ne proponi ekspresan bazan kurson de Esperanto por dezirantoj eklerni ĝin sed alceli la okazigon de progresiga kurso por komencintoj. Verdire la lingva nivelo de RET-anoj estis tiel alta, ke la programo povis ĉi-foje ne enkluzivi lingvan kurson, sed tradicie RET-oj ofertas eblojn por diversnivela dumferia studado de Esperanto, kaj ankaŭ ĉi-somere kolektiĝis grupeto de komencintaj esperantistoj, kiuj ekdeziris praktiki la lingvon, kaj al kiuj mi proponis A2-nivelan kurson, titolitan “Homoj inter homoj”.

Al la grupo aliĝis 7 personoj el 5 urboj: memlernantoj, fusaj kursfinintoj, multjaraj neaktivaj uzantoj de Esperanto. En la 9 duhoraj lecionoj la kursanoj traktis tri paroligajn temojn “Homa korpo”, “Konsultu kuraciston!”, “Sana vivmaniero”, ripetis bazajn regulojn pri la aktivaj kaj pasivaj participoj, praktikis vortfaradon en Esperanto per afiksoj, multe konversaciis kaj ludis diversajn amuzajn kaj lernigajn lingvajn ludojn. La kondiĉoj por la studado estis tre bonaj, kaj la lecionoj okazis jen en someraj laŭboj, jen en biendoma salono, jen en RET-prelegejo por spekti tie surekranajn prezentaĵojn.

En la lasta leciono la kursanoj testis siajn lingvokononjn por la A-nivelo kaj montris bonajn rezultojn. Estis rimarkeble, ke la lecionoj iom post iom kuraĝigis la kursanojn al pli aktiva parolado ne nur en la interagaj instruaj taskoj sed ankaŭ en ĉiutagaj babiladoj kaj konversacioj. Dum la adiaŭa vespero ĉiuj kursanoj, kiuj sukcese trapasis la testadon, ricevis belajn certigilojn pri la kursovizitado kaj sprite, ĝoje kaj danke alparolis publike la spertajn partoprenantojn de RET. Mi estas kontenta pri la studado, pri kontaktoj kun interesaj, afablaj kaj lernemaj gekursanoj, kiujn mi ŝatus ankoraŭfoje plezure danki kaj al kiuj mi deziras sukcesan vojon tra Esperantujo: Valentina Stulina, Eŭgeno Stulin (Taganrogo), Valerija Jareŝko (Sankt-Peterburgo), Jelena Jakovleva, Irina Jakovleva (Arĥangelsko), Jan Karapetjan (Krasnojarsko), Irina Ĉerņiŝova (Moskvo).



Vladimir Opletajev, kursgvidanto

RA-13

La 24-an _ 31-an de julio 2018 en turista bazejo "Sinemorje" ĉe Oba maro (140 km de Novosibirsk, Rusio) sukcese pasis "Renkontiĝo de Amikoj -13" (RA-13). Partoprenis 24 personoj: 1 persono el Germanio kaj 23 personoj el la azia parto de Rusio: 10 el Novosibirsk, 6 el Krasnojarsk, 4 el Novokuzneck, 2 el Tjumen' kaj unu el Tomsk.

Ĉiutage okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kiujn gvidis Darja Arbekova kaj Katerina Arbekova (ambaŭ el Novosibirsk).

Ĉiutage Eric Rademacher el Munkeno (Germanio) gvidis kursojn pri tabla teniso kaj diskutrondon pri politiko. Eric iĝis ĉampiono pri tabla teniso de tuta "Sinemorje" kaj gajnis valoran premion. En la diskutrondo li multe rakontis pri tio, kio vere okazas en la okcidentaj landoj el la politika vidpunkto, kaj pri tio, ke la okcidentaj misinformiloj ne informas aŭ misinformas pri la veraj politikaj problemoj, sed rakontas nur pri sensignifaj bagateloj.

Ĉiutage Vladimir Minin el Tomsk gvidis kurson pri granda teniso por kvin esperantistoj.

Katerina Arbekova gvidis diskutrondon pri amikeco.

Vladimir Sapojnikov el Krasnojarsk gvidis diskutrondon pri la siberia Esperanto-movado.

Evelina Sokolova ĉiutage instruis Esperanto-kantojn al komencatoj kaj ĉiuvespere ĝis malfrua nokto gvidis surtablajn Esperanto-ludojn.

Ĉiuvespere Katerina Arbekova organizis gajajn programojn (kvizojn, koncertojn, viglajn ludojn, E-konkursojn, festojn kaj multon alian). Intercetere okazis Esperanto-festo la 26-an de julio kun informado de multaj turistoj en la bazejo pri Esperanto. Posttagmeze okazis viglaj sportaj konkursoj sur la plaĝo kaj en la akvo de Oba maro.

En alia tago Vladimir Sapojnikov gvidis gajan Neptun-feston sur la plaĝo kaj la maro.

Okazis ankaŭ kutimaj distraĵoj de la turista bazejo: veturado per boatoj, katamaranoj, surakvaj bicikloj, E-kantoj ĉe nokta lignofajro, ŝaŝlikoj kun biero, laŭta kaj amuza muziko en la kafejo kaj multo alia.

RA-14 okazos sur Kamĉatka duoninsulo inter Beringa kaj Oĥotska maroj ĉe Pacifiko meze de aŭgusto 2019. La flugbiletojn necesas aĉeti jam aŭtune de la jaro 2018, kiam la biletoj estas ankoraŭ malmultekostaj. Bonvenu!

Vladimir Minin



MER-13

La 3-an de junio en hejmo de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova okazis la 13-a Moskva Esperanto-renkontiĝo, dediĉita al la naskiĝtago de Dima. Estis prelegoj, kantoj, prezentoj fare de diversaj personoj inkluzive de Mikaelo Bronŝtejn. Anna Striganova prezentis sian novan riĉe ilustritan libreton pri fabeloj, la 5-an en la serio.

Pri kelkaj agrablaj aŭgustaj renkontiĝoj de esperantistoj en Jekaterinburgo

Somero por esperantistoj estas tempo de ferioj kaj vojaĝoj, kaj kutime en Jekaterinburgo ni ne planas iujn aranĝojn por tiu tempo sed havas paŭzon en nia Esperanto-agado. Tamen ne planitaj kaj neoficialaj aranĝoj certe okazas kaj ankaŭ ĉi-aŭguste estis kelkaj agrablaj renkontiĝoj de esperantistoj.

Tiel, dimanĉe, la 5-n de aŭgusto, nia ne tre granda grupeto el tiuj, kiuj estis tiutempe en la urbo kaj emis kunripozojn en la naturo, vizitis la arbarparkon "Kalininskij". Ĝia teritorio estas sufiĉe vasta, ĝi havas ne nur densan arbaron, sed ankaŭ kelkajn lagetojn, kie eblas fiŝkapti, oportunajn laŭbojn. Ni bele promenis laŭ arbaraj padoj, maldensejoj, montetoj, spirante freŝan aeron, aŭskultante la viglan birdkantadon kaj observante kurantajn sciuretojn kaj ĝoje flugantajn papiliojn kaj libelojn. Multis mirteloj kaj eĉ foje renkontiĝis kelkloke ankoraŭ restintaj fragoj, kaj ni plezure frandis berojn. Post la promeno ni volonte piknikis, komuniĝis pri diversaj temoj kaj gratulis Lena Uspenskaja, kiu havis en la lasta tago de julio la naskiĝtagon.

Sekvantsemajne, la 10-an kaj 11-an de aŭgusto ni renkontiĝis kun la pola esperantistino Maria Dube, kiu vizitis antaŭe Kazanon kaj poste venis al Jekaterinburgo kaj planis kun grupo de rusiaj turistoj partopreni turisman marŝon en montaro norde de Uralo, al la montpasejo de Djatlov. Do, vendrede vespere ni renkontiĝis en mia laborejo en la Domo de Uralaj popoloj, interkonatiĝis kaj teŭmadis kvarope: nia gastino, Saŝa Osipova, Lena Uspenskaja kaj mi. Ankaŭ sabate ni renkontiĝis ĉe la operejo por montri al la esperantistino el Varsovio nian urbocentron. En tiu tago al nia grupo aliĝis ankaŭ du niaj esperantistinoj-novulinoj: Svetlana Ivanova kaj Ksenija Patruŝeva, kaj ili havis bonan ŝancon la unuan fojon praktiki Esperanton kun la eksterlandano. Tiutage ni ne nur promenis en la centro de la urbo, sed vizitis ankaŭ la Katedralon sur la Sango, kaj Jelcin-centron, kie ni dum unu horo restadis en la muzeo. Je la kvara horo tage ni akompanis Maria per aŭto al la fervojstacidomo, kie ŝi renkontiĝis kun sia grupo de turistoj.

La 22-n de aŭgusto vespere ŝi revenis al Jekaterinburgo post la pli ol semajna vojaĝo tra Sverdlovsk provinco: turisma marŝo al la montpasejo de Djatlov kaj posta kelktaga restado en la vilaĝoj Verĥoturje kaj Merkuŝino. Por la 23-a de aŭgusto jam anticipe estis planita vizito de la historia loko "Ganina Jama", ligita kun la pereco de la familio de la lasta rusia caro Nikolao la Dua. Sed komence nia triopo: Maria, Lena Uspenskaja kaj mi veturis per aŭto al la limo inter Eŭropo kaj Azio, laŭvoje ni vizitis memorejon pri la homoj, pereintaj pro reprezalioj dum la stalina tempo. Ni povis ankaŭ vidi relative antaŭnelonge starigitan ĉi tie

monumenton “Maskoj de funebro”, fare de la fama skulptisto Ernst Neizvestnij. La monumento vere impresis nin ĉiujn. Ĉe la limo de Eŭropo kaj Azio ni kune fotiĝis kaj poste jam direktis nin al Ganina Jama. La vetero tiutage tute ne dorlotis nin kaj pluvegis, sed tio ne malhelpis al ni sukcese realigi la planitan por la tago programon. Ni plezure promenis tra la vasta, bela kaj tre flegita teritorio de la memorloko, spirante la freŝan arbaran aeron tie, ĝuante plurajn lignajn malsimilajn unu al la alia preĝejojn, kun freŝe lavitaj post la pluvo belaj verdaj tegmentoj kaj kun brilantaj oraj kupoloj sur ili. Vizitinte kelkajn el la preĝejoj, ni iris al la memormuzeo, kiu estis antaŭnelonge inaŭgurita ĉi tie (ja ĉi-jare julie okazis la centjara mortodatreveno de la cara familio, kaj en Jekaterinburgo pasis grandioza krucprocesio kaj marŝo de pilgrimantoj kaj multaj eventoj okaze de tiu dato) . En la muzeo estas tre interese prezentita la historio de monarkio en Rusio, periodo de la regado de Romanovoj kaj de la lasta rusia caro Nikolao la Dua, multas fotoj, historiaj dokumentoj, eksponaĵoj de tiuj tempoj, kaj certe la muzeo estas vizitinda. Longe promenante sub la ombreloj dum la pluvo, ni eĉ eksentis ioman malvarmiĝon kaj deziron trinki ion varman. Tial ni vizitis tiel nomatan “Monaĥejan refektorion” por la vizitantoj, trinkis varmegan teon kun kukoj kaj veturis reen en la urbon.

La vesperon de tiu tago ni decidis kunsidi kaj vespermanĝi en la kafejo “Propra kompanio”, kie jam anticipe estis rezervitaj lokoj por nia esperantista grupo. Do, vespere al ni aliĝis ankoraŭ kelkaj jekaterinburgaj esperantistoj: Sergeo Lokis kaj la familio de Husanov: Rita, Igorj kaj Lena. Nur kiam ni jam sidis ĉe la tablo, ni subite eksciis, ke nia gastino Maria havas naskiĝtagon ĝuste la 23-an de aŭgusto. Al tio fulme reagis Rita Husanova, kiu malaperinte por kelkaj minutoj, dum estis mendataj de ni la manĝoplando kaj po pokalo de vino, post mallonga tempo revenis, atinginte per la aŭto florbutikon centre de la urbo kaj aĉetinte belan bukedon kaj memoraĵojn pri Uralo por la naskiĝintino. Ni ĝoje gratulis nian varsovia Esperanto-amikino, tostis je ŝia sano kaj poste, ĝuante bongustajn manĝojn, vikle konversaciis. Maria rakontis pri siaj impresoj de la vojaĝo tra Uralo, Rita montris la fotojn de siaj turisma vojaĝo per helikoptero en la norda Uralo kaj flosado laŭ la rivero Ĉusovaja, ankaŭ pri la somera vojaĝo al Islando, kaj Lena Uspenskaja rememoris, ke iam en sia junaĝo, kiam ŝi ĵus finis la bazan Esperanto-kurson, ŝi ekhavis la unuan korespondamikon el Pollando Kazemir Dombrovski, kun kiu poste la kontaktoj perdiĝis, kaj montris al ni lian malnovan nigra-blankan foton. Igorj Husanov surprizis ĉiujn, iom parolante kun la polino pole. Unuvorte, estis tre agrabla, memorinda vespero! Ni ĉiuj disveturis jam malfruvespere. La sekvan tagon nia pola samideanino forveturis per trajno al Moskvo, kie planis resti dum du tagoj, kaj mi sciigis al ŝi la kontaktojn de MASI-anoj, kiuj ĝuste sabate, la 25-an de aŭgusto vespere, havis Rondon de Legado. Do, Maria sukcesis aliĝi ankaŭ al tiu renkontiĝo de moskvaj esperantistoj kaj komunikiĝi kun ili.

Mi ĝojas, ke entute dum ĉiuj aŭgustaj tagoj de sia restado en Jekaterinburgo Maria konatiĝis kaj aktive komunikiĝis kun deko da jekaterinburgaj esperantistoj, inter kiuj estis ankaŭ niaj novaj Esperanto _lernantinoj: Svetlana Ivanova kaj Ksenija Patruŝeva . Ja ekzakte por tio oni lernas Esperanton!

Ni danke memoros tiun ĉi aŭguston, la lastan monaton de somero, pro tiuj agrablaj momentoj de la esperantistaj renkontiĝoj!

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo

Kongresoj

Lisbono: memintervjuo de malkaduka grumblulo

La 103-a UK ankoraŭ bruegis, kiam en FB aperis afiŝo de famulo pri ties principa nepartopreno. Ĉeestis ankaŭ klarigo pri kaŭzoj de tiu ago. Principe partopreninta la kongreson, mi (M) decidis ricevi opiniojn de same principa kongresano Bruna Ŝtono (BŜ) pri la afiŝo kaj pri la UK mem. La intervjuo okazis ĉe manĝotablo, do makuloj de ruĝa vino kaj melongena saŭco iom malhelpis redaktadon de la teksto. Pardonu.

Pri la afiŝo

M: Por komenco mi demandu, kion vi opinias pri ĉi-suba afiŝo? Jen, mi citu, mallongigante la tekston:

Ĉi-jare mi decidis ne partopreni la UKon pro diversaj kialoj: 1) pro la sezono; 2) ĉar la estraro de UEA kondukis iom kretene al mi pasintjare, kaj ŝajnas ke neniu UEA-aktvulo trovis interesa ke mi venu al Lisbono; 3) ĉar mi ne ŝatas UKojn, mi trovas ilin tro grandaj... Sed hodiaŭ mi subite rimarkis ke fakte io alia igas min malemi iri al E-kongresoj: ili estas kongresoj de esperantismo...

BŜ: Ĉu indas komenti la tri kaŭzojn de la kolego, se li mem diras, ke io alia?.. Tamen jes, mi diru, ke oni ne povas esti iomete graveda. La sezono, persona rilato al mi de tiu aŭ alia UEA-gravulo, kvanto de partoprenantoj – ĉio ĉi ne povas aborti la ĉefcelon de mia iro al UK-oj: ĝui freŝajn atingojn de alij kaj prezenti la miajn al Esperantujo, kio estas por mi UK. Nu kaj... miaopinie, kulpigi E-kongresojn pri esperantismo egalas kulpigi kompason, ke ĝia nadlo ĉiam direktas sin al nordo. Mi vizitas UK-ojn ne ofte, sed plezure, spite al evidentaĵoj kaj (ho ve!) pli-malpli ripetiĝantaj mankoj kaj fuŝaĵoj de la organizo. La 103-a ne estis escepto ĉi-rilate.

Pri la sabato

M: Ĉu ni komencu de la komenco?

BŜ: Nature. La aspekto de la kongresa saketo, _ ĝin mi ricevis senprobleme, _ estis ege plaĉa. Problemoj ekis tuj poste, dum la Movada Foiro. Ja jes, estas perfekta ideo ke reprezentantoj de diversaj unuiĝoj, asocioj, eldonejoj kotopo montru sin al la



kongresanoj jam en la alventago. Sed kies inflaminta cerbo inventis peli mil homojn en la netraireblan koridoron? Okazis tie ĉarma tohuvaĵo inter posedantoj de etaj tablospacoj kaj dezirantoj vidi tion, kio kuŝas sur la tabloj. Konjektu ankaŭ, ke ĉiuj ĵus alvenis, do, renkontante konatojn, haltis por kisoj-brakumoj, kio perfekte ŝtopis ireblecon de la amaso. Certe, estis iom agrabla por mi interfrotetado de mia brusto kaj preterpasanta mamaro... sed mi preferus etoson malpli apokaliptan. La fantasmagorian bildon kompletigis triopo de blindaj muzikistoj, venigitaj ĉi-tien per ies senpripensa volo. Eksidintaj sur altaĵo ili komencis muzikumi kaj eĉ kanti, tute neaŭdeblaj pro la foira bruego kaj vere kompatindaj...

M: Verŝajne ne estis alia solvo...

BŜ: Kial ne? Supozeble oni povus starigi la foir-tablojn libere ekster la ejo, en la apuda sporta placo. Ĉu estis malpermeso pri tio flanke de la polico aŭ de la universitata estraro?

Pri la dimanĉo

M: Eble mi evitu demandi pri la solena malfermo, ja absolute tradicia kaj, laŭ mi, enuega programero...

BŜ: Tamen ege impona! En grandega salono, rezervita speciale nur por la malfermo kaj por la Nacia vespero. Kun modere longaj paroladoj de la gravuloj, ho, eĉ Mark Fettes mem libervole limigis sin ĉe dek minutoj! Cetere, la Nacia vespero plaĉis al mi multe pli: impresige kortuŝaj kantoj-faduoj, popoldancoj fajraj, mirinde similaj al tio, kion oni faras dum vilaĝaj festoj en mia naskiĝlando – Ukrainio. Malkuraĝigis min nur ke la ĉarmulinoj portugalaj havas ne unu jupon, sed kelkajn plus ĝisgenuan puntitan kalsonon – tro multan tempon prenis senvestiĝo, ĉu ne?

M: Be, se fraŭlino estas plaĉa, mi provus ne hasti. Tamen, miascie, vi havis ankaŭ aŭtoran duonhoron ĉi-tage. Ĉu tiu estis senriproĉa?

BŜ: Ho, super ajnaj laŭdoj! Al mi ege plaĉis tiu kolombejo super la libroservo. Des pli, ĉar por mia duonhoron ĝi estis plenplena. Mi vizitis kelkajn duonhorojn de aliaj aŭtoroj, ankaŭ pri tiuj absolute kontentas mia animo.

Pri la lundo

M: La unuan duontagon de lundo oni nun nomas “kleriga”. Ĉu vi kleriĝis?

BŜ: Ve, kaŭze de antaŭplanita provkantado mi sukcesis viziti nur la diskuton “Esperanto kaj arto”. Estis voĉigitaj multaj utilaj ideoj; mi esperas, ke la kunordiganto de la diskuto registris ĉion. Post repliko de Humphrey pri traduko mi levis la manon por prezenti mian sugeston, kaj mi restadis kun la mano levita dum dek minutoj. Nerimarkita.

M: Ĉu vi ŝatus prezenti la sugeston nun?

BŜ: Do jes, ĉar estas utila. Por ricevi permeson pri traduko kaj eldono diverstempe mi aliris kelkajn famegajn aŭtorojn, kaj ne kun ĉiu la traktado estis facila. Ĉar mi estas nur mi. UEA povus listigi epokfarajn verkojn de la moderna literaturo, kaj aliri la aŭtorojn, profitante aŭtoritaton de la Asocio – mi ne dubas, ke tio faciligus permesricevon. Poste oni elektu tradukonton por ĉiu verko. Mi ne rifuzus esti inter tiuj.



M: Ĉu laboravido?

BŜ: Verŝajne. Mia sata stomako igas la cerbon labori. Bonegajn tagmanĝojn mi ricevadis dumkongrese kontraŭ nur 2,5 eŭroj – mirinda kaj admirinda prezo!

M: Do kun la sata stomako vi iris al la koncerto de ciganaj kantoj...

BŜ: Eĥ, ne tiom simplas ĉio ĉe la kongres-ĉefoj... Estas mi, kiu laŭ peto de konata serba aktoro Saša Pilipoviĉ tradukis aron da ciganaj kantoj. Memkompreneble, mi havis specialan aspiron al tiu koncerto. Ĉe la eliro el la klerigejo mi estis kaptita de panikanta Saša. Li diris, ke oni (mi eĉ diru: ONI) ŝanĝas ejon kaj tempon por la koncerto, imagu – unu horon antaŭ la komenco! Iel-tiel mi trankviligis lin, kaj ni kune iris al ONI. Per dueta plorplendo ni ricevis promeson, ke estos ŝanĝota nur la ejo, kaj

ke pri tio ONI informos la kongresanojn... Eĉ alieje la ciganaj kantoj estis aplaŭdege akceptitaj, tamen ŝajnas al mi, ke gravan parton de la publiko Saša perdis.

M: Bedaŭrindas...

BŜ: Ho jes! Pro ĉagreno mi eĉ ne vizitis la balon, elektinte senĉagrenigan ebriiĝon.

Pri la mardo

M: En la marda posttagmezo devis okazi prelego-koncerto de vi kaj Sergio la Terura. Supozu mi, ke vi kune provkantis la tutan matenon, ĉu ne?

BŜ: Tute ne! Al la 9.3 mi venis por vica aŭtoro duonhoron, interesa por mi. Ankaŭ Sergio venis tien. Poste ni disiris al niaj hoteloj por preni duŝon kaj ŝanĝi vestojn. Vidu, en junio Sergio speciale venis al mi el Latvio, kie li loĝas. Dum kvin tagoj ni kompilis la programon, preparis ilustraĵojn, interkantajn tekstojn, provkantis ĉion. La programon kun neniam antaŭe tuŝita temo pri la rusa barda kulturo ni pene enmetis en kadron de unu horo – tioman tempon ni petis de la organizantoj. Ni ricevis nur 45 minutojn. Kaj tion ni eksciis nur el la Kongresa Libro. Inter nia koncerto kaj la publika kunsido de la Akademio ONI metis kvaronhoran paŭzon. Mi interkonsentis kun Sergio kurtigi la prezentajn tekstojn pri ĉiu bardo kaj (se la publiko ŝatos la koncerton!) ŝteli kvin-sep minutojn el tiu paŭzo por almenaŭ la kantan programon prezenti tutece. La salono estis plenplena kaj la publiko videble ŝategis la koncerton. Sed ONI aperis antaŭ ni horloĝe akurate kaj postulis nian tujan forbalaĝon...

M: Nu... ONI-an agon mi povas kompreni: la Akademianoj devas havi ioman tempon por prepari la kunsidon.

BŜ: Mi konsentas kun senŝerca estimo al nia Akademio. Samtempe mi restu ĉe la opinio, ke ankaŭ nia laboro estas estiminda. Ĉu ONI ne povus ŝanĝi la ejon por ni, aŭ por la Akademianoj samkiel ONI agis dimanĉe pri la cigano?.. La evento ĉagrenis min tiom, ke mi eĉ ne dancis vespere kun JoMo!

Pri la jaŭdo

M: Ĉu la ĉagreno pasis dum la merkreda ripozo?

BŜ: Certe, jes! Ni vizitis Atlantikon kaj ties ŝaŭmo forviŝis ĉiujn ĉagrenojn. Do jaŭde ekde mateno mi kun ĝuo ĉeestis du aŭtorajn duonhorojn, ankaŭ la prezentadon "Libroj de la Jaro".

Kun Georgo Handzlik mi sukcesis viziti ankaŭ la salonon Macedo por la lasta elektado de partoprenantoj de la Internacia Vespere, kaj ni estis akceptitaj!

M: Brile!

BŜ: Ne saltu al konkludoj – tiel diras la britoj. Duonhoron poste en la manĝejo ONI informis min, ke la akcepto estas nuligita – kaj por mi, kaj por Handzlik.

M: Ho! Sed kiakaŭze?

BŜ: ONI klarigis, ke mi kaj Handzlik, ankaŭ Martin, Kajto k.a. artistoj, kiuj havis apartajn koncertojn en UK-programo kaj multfoje prezentis sin en antaŭaj UK-oj, devas cedi, por ke novaj artistoj havu ŝancon montri sian arton al la esperantistaro.

M: Hm... Ankaŭ tiu opinio ŝajnas al mi racia.

BŜ: Mi nek kontestas, nek konsentas. Nepre devas esti malfermita vojo por novaj talentuloj. Sed, unue, mi emfazu, ke enestas flanke de ONI certa hipokriteco: la tagaj koncertoj okazas samtempe kun aliaj programeroj kaj, ĉefe, kun ekskursoj, kiujn aĉetis ĉu ne duono de la kongresanoj antaŭ aŭdiĝo de la kongresa programo. Multaj ges-anoj bedaŭris, ke ĝuste pro tio ili ne sukcesis trafi tiun aŭ alian aspiratan koncerton. Due, mi nepre diru, ke por mia kompano, bardo Sergeo tiu-ĉi UK estis la unua, kaj ke la ĉarma kaj altnivela artistino Dominika Handzlik prezentis sin al UK-anoj lastfoje kiam ŝi havis kvin (!) jarojn – ĉu ili ne estas novaj artistoj? Kaj trie, ni vidis, ke, rezulte de tiaspeca elekta politiko, la tuta kongresanaro anstataŭ impresiga altkvalita spektaklo ricevis amatorecan kungluaĵon kun kelkaj helaj ekbriloj, kiel tiu de la koruso « Interkant' »...

M: Kara, mi sentas, ke vi estas ĝislarne ofendita...

BŜ: Vi eraras pri mia ofendiĝo. Min neniam ofendas mia foresto surpodie dum la lasta kongresa vespero, ĉar mi ne estas profesia artisto. Sed mi sincere kompatas kaj la homojn, kiujn mi nomis supre, kaj la publikon. Ripetu mi: novaj talentuloj devas ricevi vojon al la publiko. Estas multaj eblecoj por aranĝi tion. Ekzemple, en 1992, en Vieno, ricevinte aprobon de tiama KKS, mi organizis apartan unuoran koncerton por novaj artistoj – tiel por la unua fojo prezentis sin Anjo Amika, Nikolao Lozgaĉev... En 2009, en Bjalistoko Georgo Handzlik kaj mi dum kelkaj vesper-noktoj (ĝis post la noktomezo) gvidis la programon de la Arta Kafejo, kie prezentis sin ĉiuj dezirantaj artistoj. Fine, al la plej aplaŭdataj de la publiko, eblas doni tempon en la programo de la Internacia Vespere.

M: Cetere, mi kaptis la vorton «kafejo» _ja en la programo de la 103-a estis Scienca Kafejo, ĉu ne?

BŜ: Aj! Kafejo estas komforta loko kun tabloj, kafo kaj varietea programo, eĉ se scienca. Sed ni havis sufokejon, kie la prelegantoj pene prezentis, sed la aŭskultantoj pene kaptis dudekminutajn dekoktaĵojn el bonaj unuhoraj prelegoj. Iom pri la hidrargo, iom pri la fabelaj mondoj, iom pri la mortanta lingvo... Por kio do tio-ĉi? Se UEA ne havas monon por honorariigi unuoran prelegon, mi konsentus prelegi senpage. Supozeble, ankaŭ aliaj prelegantoj rezignus pri la honorario por gajni la kvaliton. Ne sufiĉas ejoj? Mi opinias, ke tiu problemo estus facile solvebla en la granda universitato. Sed tio, kio estis – mi petus, ke ĝi ne plu estu.

Pri la vendredo kaj resume

M: Ĉu endas ion diri pri la vendredo, se la Internacian Vesperon vi jam primokis?

BŜ: Endas. Ĉiuj miaj nelaŭdaj diraĵoj ne estas moko. Nur konsiloj, ĉar mi esperas, ke ĉion ĉi oni tre facile povas korekti, elimini, ne allasi. Kaj krome – okazis stela evento vendrede – tiu estis por mi Dominika Handzlik, kiun mi neniam antaŭe vidis surpodie. La voĉo, la violono! Pare kun la patro ŝi sukcesis tuj konkeri la salonon, kaj laŭmerite ili ricevis aplaŭdegojn.

M: Tamen, tamen... Post tiom da, mildadire, malglataĵoj ĉu vi emas viziti UK-ojn en estonto?

BŜ: Jes. Mi ne estas junulo, sed se la destin' – kaprica damo donacos al mi pliajn jarojn kun normala sano, mi ŝatus partopreni en ontaj kongresoj. Partopreni aktive kaj helpi al la organizantoj fari tiun manifestacion de E-kulturo pli riĉenhava, animtuŝa, memorinda.

Mikaelo Bronŝtejn

Madridaj kongresoj: iom el la vivo de la partoprenantino

En tiu ĉi somero Madrido akceptis du gravajn eventojn: 77-an Hispanan Kongreson de Esperanto (20-22.07) kaj 51-an Kongreson de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21-28.07). La koincido de la du grandaj aranĝoj ebligis al partoprenantoj de unu el ili ekhavi imagojn ankaŭ pri la alia.

La Hispana Kongreso liveris al mi du ĉefajn impresojn – fakte, forte ligitajn. La unua estas konsciiĝo pri riĉeco kaj seriozeco de hispana landa Movado. La dua estas admiro pri abundo de mezaĝaj aktivuloj – maturaj, energiaj, saĝaj, belaj viroj el diversaj hispanaj urboj. Ĝuste ili, entuziasme kaj profesie laborantaj por la landa Movado, ĉu ĝeneral-organiza, ĉu en specialaj kampoj, faras la landan movadon, eble, la plej fortan en Eŭropo. Estas rimarkinde, ke hispanaj kongresoj okazadas ĉiujare ĉiam en alia ŝtata provinco kaj la loka ĉeforganizanto de la kongreso estas ĉiam nova persono.

Hispanaj esperantistoj multe atentis, gardas kaj evoluigas sian nacian esperantan kulturon kaj historion. Al novaj esploroj kaj al prezentoj de noveldonitaj libroj estis dediĉita granda parto de la kongresa programo – krom memkompreneblaj kunvenoj de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj multegaj ekskursoj.

Mi ĉeestis kortuŝajn rememorojn de Dennis Keefe pri lia juneco "Observoj de naiva novbakita esperantisto en la Madrida Esperanto-Liceo de 1980 ĝis 1988". Dennis ne nur rakontis pri kiel li lernis ĉi tie Esperanton, sed ankaŭ varme kaj kun mola humoro menciis ĉiujn esperantistojn, kiujn li renkontis tiutempe: iujn ĉeestintajn en la salono, iujn jam forpasintajn, sed bone memoratajn de la vasta aŭskultantaro.

Multe interesis min la prelego de Riccardo Lamperti, kiu prezentis rezultojn de siaj esploroj pri ligo de klasikulo de la hispana literaturo Umberto Unamuno kun Esperanto: "Unamuno estis volapukisto! Unamuno, Salamanko kaj Esperanto". Post la prelego mi surprizis la ĉeestintojn per la rakonto pri spektaklo en la Teatro Mossovet en Moskvo, kie en januaro 2018 la unuan fojon en historio de la rusa teatro la fama romano de Unamuno "Nebulo" estis prezentita kun granda fragmento, ludita en Esperanto.

Bedaŭrinde, pro tempa koincido kun organiza kunveno por la prezentantoj de la Lingva Festivalo mi ne povis ĉeesti la prelegon de mia korespondanto kaj iusence kolego profesoro Vicente Manzano-Arrondo “Senpaga utila esplorado, aŭ Kiel oni gajnis ŝancon en Universitato de Seviljo”, kie li rakontis pri sia sperto sentrude atentigi pri Esperanto siajn kolegojn kaj studentaron de granda universitato.

La 22-an de julio, dimanĉe, dum la tiel nomata Komuna Tago (tago de ambaŭ kongresoj), okazis la unua en Hispanio Lingva Festivalo, bedaŭrinde, nur por esperantistoj. Malgraŭ ke Dennis Keefe speciale venis Madridon je kelkaj tagoj pli frue, liaj penoj altiri al la Festivalo eksteran publikon fiaskis. Sed ni certe rajtas taksu la Festivalon sukcesa, ne nur ĉar al la kongresanoj estis prezentitaj 28 lingvoj per fortoj de la kongres-partoprenantoj kaj ni aŭdis multajn aprobajn vortojn pri la aranĝo, sed ĉefe pro tio, ke la unuan fojon dum internacia esperantista aranĝo estis provita la rusia modelo de LF (kun Malfermo kaj Fermo, kiujn eĉ Dennis Keefe – la parto de Lingvaj Festivaloj – neniam praktikis) kaj ankaŭ pro tio, ke ni kun Dennis ĉie, ofte, multe kaj detale klarigadis, kio estas vera LF kaj kial indas organizi ĝin ankaŭ en deven-landoj de la kongresanoj. La 27-an de julio dum la Simpozio, jam tradicia por ILEI-Kongresoj, mia prelego “Lingvaj Festivaloj: lingva konsciigo sub la verda standardo” estis favore akceptita de la simpozianoj. Ni semas kaj semas... Eble, la klasikmodelaj Lingvaj Festivaloj iam konkeros la mondon... La organizadon de la Madrida LF multe kontribuis ankaŭ la rusa estrarano de ILEI Jelena Nadikova, helpis, kompreneble, ankaŭ mem Antonio del Barrio – la prezidanto de HEF <https://www.youtube.com/watch?v=fell0n9bBAY&t=78s>.

La tiutagan programon antaŭ la Lingva Festivalo mi – ve! – devis plene preterlasi, pro la bonega ekskurso al la antikva universitata urbo Alcalá de Henares. Intertempe Jelena Nadikova kuncerbumadis pri la revuo de ILEI “Juna Amiko”, internacia teamo de trejnistoj okazigis AMO-Seminarion kaj Katalin Kovač startigis la E-Instruistan Trejnadon. Tamen Solena Malfermo de ILEI-Kongreso okazis nur matene de la sekva tago. La ILEI-Prezidanto Mireille Grosjean faris la enkondukan prelegon en la kongresan temon, kiu estis “La kultura heredaĵo de Esperanto”.

Post la tagmanĝo, je la 15-a horo, ekis mia prelego “E-kurso Faru la Rondon! Sekretoj de sukcesintoj”. Ŝajne, neniam antaŭe mi prelegis en tiaj perfektaj kondiĉoj. La salono kun molaj foteloj kaj ekrano tra la tuta muro similis kinohalon por 30-40 homoj, la lumbildoj estis facile manipuleblaj per komputilo sur la flanka tablo. La salono estis plena, kelkaj dolĉe dormis en la mola lumo de la ekrano, sed plej granda parto de la publiko estis kontentige aktiva kaj scivolema. Ĉe tio indas menci, ke parto de la programo pasis en la konstruaĵo de la filologia fakultato de la grandega Nacia universitato de neĉeesta edukado (UNED), alia parto (ankaŭ la Lingva Festivalo) okazis en la studentaj rezidejoj: ni tie loĝis kaj manĝis, tamen ankaŭ tie estis kaj klasĉambroj, kaj teatraj salonoj. La kondiĉoj por la kongresoj estis vere perfektaj – kaj malmultekostaj por partoprenantoj.

Kun bedaŭro preterlasinte pro la propra elpaŝo la “Babiladon kun Jorge Camacho pri verkado kaj tradukado en Esperanto”, mi kuris al la najbara salono por la prelego de Dennis Keefe “UNESKO-Kuriero en niaj esperantaj klasĉambroj” https://www.youtube.com/watch?v=v6MWx_C0hAg. Dennis rakontis, kiel indas uzi dum instruado ĉe lokaj kluboj la tekstojn de la UNESKO-Kuriero – aperis jam kvin numeroj en Esperanto. Kial ĝuste ties tekstojn? Por popularigi la Kurieron kaj por prezenti la Esperanto-aferton serioza. Ne temas pri lingva kurso de Esperanto, temas pri kurso pri ideoj, pri tio, kio okazas en nia mondo. Vespere mi kun mia amikino el Krasnojarsko Jelena Ŝaravina belege promenis tra nokta Madrido kun negranda grupo de kongresanoj, gvidataj de Alejandro Pareja.

La 24-an de julio je la 11-a horo okazis mia sekva prelego “Esperanto-Poŝtkruciĝo kiel voĵeto en kaj al Esperantujo” – en la sama bonega salono de la filologia fakultato. Ankaŭ tiu ĉi programo pasis tre agrable kaj amiketose. La saman tagon mi sukcesis ĉeesti la porinstruistan ekzamenon dum E-Instruista Trejnado de Katalin Kovač. Du E-instruistoj – Elizabeth el Francio kaj Nikolao el Italio – sinsekve prezentis fragmentojn el siaj kursoj kaj la trejnatistoj faris al ili demandojn kaj siajn rimarkojn. Estis tre utile kaj instrue. Pro iuj interesaj paroloj post la prelego mi mem ne rimarkis, kiel kompanie iris al alia konstruaĵo kaj pro tio denove preterlasis la AMO-Seminarion – pri eksteraj rilatoj kaj la prelegon de la bona Rob Moerbeek pri lingvaj esploraĵoj. Ofta situacio dum kongresoj: jen kaj jen okazas, ke oni denove preterlasis ion tian, kion nepre intencis partopreni... Vespere mi estis iom konsolita de la belega emociplena Kajto-koncerto.

Pri la ekskursita tago aŭ ĉion, aŭ nenion... Ni vojaĝis al la belega Toledo. Punkto. La temo de aparta artikolo. La 26-a de julio estis la unua tago de la Simpozio, kiu havis sian apartan programon paralele al la kongresa. Tamen nek tiu, nek alia – por mi. Ja absolute ne eblis forlasi Madridon sen viziti la grandiozan nacian artan muzeon de Thyssen-Bornemisza, kie ni kun Lena Ŝaravina pasigis la tutan tagon – kaj poste per taksio hastegis al la vespera spektaklo “Vivu la Teatro!”. Migul Fernández, la fama kaj amata en Hispanio verkisto, poeto, kantisto, muzikisto kaj Esperanta aktivulo https://www.youtube.com/watch?v=x_WgYbw6Pok jam la 5-an fojon realigas en grandaj E-aranĝoj sian muzikan deklam-projekton kun partopreno de kongresanoj plej diversnaciaj. Nepre spektindas!

Kaj jen la 27-a de julio – la lasta tago en Hispanio. Ĝi komenciĝis por mi en la Simpozio, je la 10-a horo, per mia prelego pri rusiaj lingvaj festivaloj, jam supre menciita. Tuj poste mi sukcesas trafi finon de la prelego de miaj novaj amikoj Jérémie Sabiyumva kaj Adjévi Adjé pri afrika kulturo en E-movado – kaj jam necesis kuri tagmanĝi – por poste ne malfrui al la prezento de la Kongreslando-2019 kaj nova Estraro de ILEI. Tiun necesis nepre ĉeesti, ĉar Katalin Kovač enmanigadis tie diplomojn de la maja KER-ekzameno, kaj mi solene ricevis tiujn por ĉiuj moskvaj ekzamenitoj. Pri Internacia adiaŭa vespero plene zorgis Jelena Nadikova, ĝi ĉi-foje estis longa kaj sufiĉe interesa...

Konkludoj: ne eblas ĉirkaŭbraki neĉirkaŭbrakeblaĵojn... Malgraŭ ke mi kun Lena Ŝaravina venis tri tagojn antaŭ la kongresoj, multo interesa restis ne vidita en Madrido. Malgraŭ penoj partopreni la kongresajn programojn, multo interesa restis ne vizitita... Malgraŭ multaj pli profundaj amikiĝoj kaj novaj konatiĝoj, multaj kongresanoj restis nur pretere salutataj... Kion fari?! Plu vivi en Esperantujo kaj ĝui ĝin!



Irina Gončarova

SAT-anoj ekfrontas la defion de novaj komunikaj teknologioj

La 91-a kongreso de SAT okazis en Kragujevac (Serbio) de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto. Kragujevac estas urbo kun 180.000 loĝantoj kaj la kvara laŭ grandeco en Serbio. Ĝi estas nekutime interesa historie pro sia rolo kiel serbia ĉefurbo en la frua 19-a jc. kaj kiel situo de la unuaj industrioj en Serbio, notinde la armilfabriko VTZ (poste iĝinta la aŭtofabriko Zastava). Malgraŭ tio, ĝi restas nekutime fora de la kutimaj turistaj itineroj, bona loko por observi la vivon de la kongreslando.

La kongrestemo “Eo kaj transnacia komunikado en la epoko de informteknologioj” estis aktuala afero, vera defio por SAT, kiel por aliaj asocioj de esperantuloj. Novaj interret-bazitaj komunikaj ebloj logas per la promeso de pli densa kunretigo, samtempe faras postulojn al la membroj, ĉefe lernajn. Tial SAT alprenis ĉi tiun temon. En unu kunveno oni preparolis “kiel konstrui retan decid-sistemon



por sufiĉe facile intervenigi SAT-membrojn en ĉiutaga vivo por pli demokratiaj administrado kaj strukturo de SAT” kaj samtempe oni praktike ekzercis tion per reta partoprenigo de kelkaj nekongresantaj membroj. Oni komencas paroli pri retaj platformoj faciligantaj la praktikon de rekta demokratio ĉe disaj homgrupoj kaj asocioj. Tio estas nova tereno por SAT kaj la SAT-anoj devas ankoraŭ lerni pri ili. Iom pli konkretiĝis la propono regule fari opiniosondojn inter la membraro. En la ĉi-jara Gvidrezolucio oni “subtenas la proponon, ke la PK [Plenum-Komitato] okazigu regulajn perretajn opiniosondojn inter la membroj pri SAT-specifaj kaj ĝeneralaj politikaj kaj sociaj temoj”.

La kunvenintoj konstatis kun bedaŭro, ke unu “malnovan” komunikrimedon kelkaj uzas ne plej celtaŭge: la dissendoliston. La Gvidrezolucio “instigas la membrojn al limigo de insultaj interŝanĝoj en la SAT-diskutlisto por ne fuĝigi la partoprenantajn SAT-anojn kaj permesi pli da fruktodonaj debatoj por plievoluigi la SAT-movadon” kaj “deziras, ke SAT-diskuto pliboniĝu per partopreno de pli da kamaradoj kaj per kreado de malpli babileca kaj pli serioza debata etoso en ĝi”.

Krom komunikado, ankaŭ aliaj temoj – politikaj, kulturaj, historiaj, distraj, artaj, movadaj – havis lokon en la programo: “Ekologiaj aspektoj de veganismo” (Markovo-Vito), ekspozicio kaj metiejo de flikkudraĵoj (Biljana Ostojiĉ), “(Koreaj) infanlibroj je historia, socia, laborista vidpunktoj” (Hyunsoo [Paz] Jung), “Esperanto-Centro en Rumonge” (Johan Derks), “Landaj retdiskutlistoj estas simptomo de ŝovinismo” (Johan Derks), “Kraljeviĉ Marko” (Velibor Simović), “Balkano – ĉu insultnomo” (Ĵivorad Jevtiĉ), “Esperanto en mia urbo Banja Luka” (Miĉo Vrhovac), “Portreti Zamenhof per branĉeta karbo” (HO Song), “El la portugala literaturo” (Rob Moerbeek), “Ĉu eblas pere de Esperanto eduki altlerneje en la eksternacia sent-, pens- kaj agad-kapablo?” (Saioa Escobar Calzada), “Atentindaj stumbligiloj en Esperanto” (Rob Moerbeek), prezento de du libroj: “Tagoj kaj ruinoj” kaj “Antaŭ unu jarcento” (Xavi Alcalde), “Eŭropaj reeĥoj de serbaj popolaj kantoj” (Miodrag Stojanović), “‘Animo’ en la serba popola poezio” (Miomirka Kovačević), “Pri kreinto de fotografio” (Jocelyne Monneret), “Distra horo pri montaraj floroj” (Marcelo Redulez kaj Klodin’ Pomiról).

Kunvenis pluraj el la SAT-frakcioj: liberecana, komunista, ekologiisma, sennaciisma, vegetara ; ankaŭ la Poesperanta Fako kaj la LEA-Komitato (kies rolo estas kunordigi laboron de lingvoteritoriaj laboristaj poesperantaj grupoj). Rezulte de diskuto dum la kunveno de la Poesperanta Fako, la kongreso kuraĝigis funkciigi Vikipedian grupon por nutri artikolojn, kiuj rilatas al la SAT-movado.

La organizintoj de la kongreso meritas multe da danko pro la ĉi-jare aparte riĉa kultura kaj arta programo, al kio favore influis tio, ke la ĉefa organizanto mem estas profesie aktoro. En la vesperoj oni ĝuis elstaran popolmuzikan-dancan nacian vesperon en la urba teatro, muzikprezentadojn de JOMO kaj de Georgo Handzlik kune kun sia filino Dominika, prezenton de La kredito en la plenumo de Verda Banano (G. Handzlik + Saša Pilipović). En la adiaŭa vespero kantis esperantista ina kantgrupo el Serbio, prezentantoj de ciganaj kanzonoj Saša Pilipović kaj surprizgasto – unu el la plej elstaraj operkantistoj tenoraj de Serbio, Voja Spasić. Ankaŭ notindas, ke plurmaniere oni rilatis kun neesperantistoj de la urbo, oficiala akcepto de la urbestro, gastigado en hotelo, en kiu gastis ne nur la kongreso, sed ankaŭ aliaj klientoj, kulturaj vesperoj malfermitaj al ekstera publiko kaj kun dulingva prezento.

Ekskurso kondukis tra la historia urbocentro kun la historia fabriko de armiloj, kies unu halo estas nun muzeo reliefiganta ankaŭ la batalon de la laborista movado por memregado. Dum tuttaga ekskurso oni vidis la monaĥejon Manasija, la kavernon de Resava kaj la akvofalon Granda Bruo kun apuda restoracio. Okazis plurhora ekskurso al la memorparko kaj muzeo “Oktobro de Kragujevac” rande de la urbo, dediĉitaj al kelkmilo da viktimoj de nazia teroro pafmortigitaj tiuloke la 21-an de oktobro 1941. Tritaga postkongresa ekskurso sekvis “Vojojn de vino kaj historio” en la montaraj de orienta Serbio.

La ĉiujara okazigo de tutsemajna kongreso ne nur ebligas al SAT prezenti enhavriĉan programon, sed ankaŭ al multaj aktivaj membroj kaj ne-membroj resti en proksima kontakto unuj kun aliaj. Tio inhibas amalgamiĝon kun la siadifine “neŭtrala” esperantula medio – kun kiu oni tamen restas en amikaj rilatoj.

Laborgrupo komisiita de la Poesperanta Fako

Decido de la Estraro de REU

La Estraro de Rusia Esperantista Unio proklamas sinjorinon Irina Gončarova



**“Eminenta Esperanto-instruisto de la lernojaro 2017–2018”
pro sukcesa gvidado de diversnivelaj Esperanto-kursoj,
apogado kaj lertigo de kursfinintoj prepare al KER-ekzameno,
diskonigo de propraj instruistaj spertoj.**

**Ŝujo, la 1-an de julio 2018
Prezidanto de REU**

Svetlana Smetanina

Raporto pri la instruado de Esperanto en la lernojaro 2017 – 2018

Instruado de Esperanto estas unu el la ĉefaj kaj prioritataj statutaj celoj de REU. La Estraro de REU ne limigas la agadkampon nur ekskluzive per atento al instruemaj membroj de la Unio sed penas kunlabori kun ĉiuj instruantoj de Esperanto enlande. Entute en la pasinta lernojaro en Rusio estis okazigitaj ĉirkaŭ trideko da diversstipaj kursoj, pri dudek unu kursoj estas ricevitaj raportoj, pri kvar okazigitaj kursoj en Krasnojarsko somermeze estas aldone ricevitaj informoj de Vladimir Sapojnikov. Sekve la interpretado de statistikaj rilatoj nur al la disponigataj informoj pri la gviditaj kursoj ĝis junio 2018.

1. Kursgvidantoj

La personeco de kursgvidantoj grave premias definitivajn rezultojn kaj sukcesojn en la tuta instrua procezo. Sen instruistaj entuziasmo, inventemo, plena sindediĉo al la afero, profesiaj kapabloj kaj spertoj neniam eblas rimarkindaj atingoj. Kursgvidantoj estas homoj, kies sindona agado antaŭenigas la movadon kaj kreas pontojn inter diversgeneraciaj ligoj de esperantistoj.

1.1. La averaĝa esperantista aĝo de kursgvidantoj estas 24 jaroj (23 jaroj ĉe viraj instruistoj, 26 jaroj ĉe instruistinoj), kaj ĉi tiu nombro ebligas tre gravan pozitivan fakton, ke kursojn gvidas plej ofte spertaj esperantistoj kapablaj kvalite peri lingvokononajn kaj celkonscie rekrutiĝi, enkomunigi kaj kapabligi novulojn. Sendiskutebla kaj estiminda rekordulo estas Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino), kiu esperantistas jam 56 jarojn.

1.2. Diplomitaj lingvoinstruistoj kaj filologoj konsistigas 40% de la kursgvidantoj. Inter la raportintaj instruistoj pli multas viroj (57%). Duono de kursgvidantoj apartenas al REU kiel ĝiaj individuaj membroj. Ili organizis kaj gvidis entute 70% de ĉiuj pritraktitaj kursoj.

2. Kursoj

Kurso estas serio de lecionoj, konsistiganta regulan instruon pri scienco, arto aŭ metio.

2.1. La okazigitaj kursoj celis precipe du referencnivelojn: A1- Alpaŝo, A2 – Elano por baznivela lingvouzantoj kaj B1 – Salto, B2 – Flugo por memstaraj lingvouzantoj. La altŝtupaj C1 – Aŭtonomeco kaj C2 – Pinto restis ekster interesoj aŭ ebloj de kursorganizantoj. La baznivela kurso A1 kaj A2 alcelis 65% de la grupoj (14 grupoj), dum la B-nivela kurso (daŭrigaj / progresigaj / perfektigaj) estis preferataj ĉe triono de kursogrupoj (7 grupoj).

2.2. Ankaŭ la nomoj de kursoj plejofte respegulas tradicie la atingotan lingvonivelon “Esperanto por komencantoj” aŭ “Esperanto por progresantoj”, kvankam ankaŭ interesaj originalaj kaj ekzotaj kursotitoloj estas menciindaj, ekzemple: “FaRo” (Faru la rondon!), “KoRo” (“Konversacia rondo”), “Prepara kurso por KER-ekzameno” de Irina Gončarova, “Esperanto en „Aliaj mondoj” de Vjaĉeslav Ivanov.

2.3. La klasifikado de kursoj laŭ tipoj ne montras riĉan diversecon: 80% estas movadaj kursoj, 20% – universitataj kursoj. La movadaj kursoj disbranĉiĝas je klubaj / societaj kursoj – 3; dumarangaj kursoj – 4, privataj kursoj, inkluzive de du grupoj de aŭtora kurso – 10.

2.4. Gvidantoj de movadaj societaj aŭ privataj kursoj, kiuj kutime trovas senpagajn kursejojn en kulturpalacoj aŭ bibliotekoj, en kafejoj aŭ en privataj loĝejoj, ne havas (ne verkas) detalan programon de siaj kursoj, ĉar ili ne bezonas aprobon de la programoj fare de kursgastigantaj institucioj. Male la oficialaj universitataj kursoj sen koncernaj dokumentoj ne rajtas funkcii, ekzemple, la kurso de Anna Striganova ĉe Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN, Moskvo) posedas la oficile konfirmitajn programon, instruhoraron kaj koneksan leciontabelon.

2.5. Kursodaŭro kaj instruhoraro

	Mezuma kursodaŭro en monatoj	Mezuma nombro de lecionoj por ĉiu grupo	Mezuma daŭro de unu leciono en instruhoroj (40 – 60 minutoj)
Baza lingvouzado: A1, A2	3 monatoj	11 lecionoj	2 horoj
Memstara lingvouzado: B1, B2	4 monatoj	14 lecionoj	1,5 horoj

2.6. Urboj, en kiuj okazis kursoj de Esperanto (Datumoj konformas al la ricevitaĵaj raportoj)

N ^o	Urbo	Instruisto	Nivelo de la kurso
1	Jekaterinburgo (Aŭtuna lingvotrejnado)	Darja Zelenina, Vladimir Opletajev, Roman Jefremov, Konstantin Ĥlizov, Tatjana Vŝivceva, Irina Gonĉarova	A1
2	Jekaterinburgo (Aŭtuna lingvotrejnado)	Darja Zelenina, Vladimir Opletajev, Roman Jefremov	B2
3	Krasnojarsko	Vladimir Sapoĵnikov	A1
4	Krasnojarsko	Vladimir Sapoĵnikov	A1
5	Krasnojarsko	Vladimir Sapoĵnikov	A1
6	Krasnojarsko	Vladimir Sapoĵnikov	A1
7	Moskvo (FaRo – 49)	Irina Gonĉarova	A1, A2
8	Moskvo (FaRo – 50)	Irina Gonĉarova	A1, A2
9	Moskvo	Irina Gonĉarova	B1, B2
10	Moskvo	Artur Grigorjev	A1
11	Moskvo	Anna Striganova	A1, A2
12	Moskvo	Anna Striganova	B1, B2
13	Murmansko	Andrej Rjazancev	B1, B2
14	Novokuznecko	Tatjana Kolajeva, Nina Lvova	A1
15	Omsko	Vasilij Masjagin	A1
16	Omsko	Vasilij Masjagin	A1
17	Otradnaja, Krasnodara regiono	Aleksej Borodin	A1
18	Poŝehonjo (RET-2017)	Mikaelo Certilov	A1
19	Poŝehonjo (RET-2017)	Irina Gonĉarova	B1
20	Sankt-Peterburgo	Vjaĉeslav Ivanov	A1, A2
21	Surguto	Vladimir Opletajev	A1
22	Surguto	Vladimir Opletajev	A2
23	Tihvino	Mikaelo Bronŝtejn	B1, B2
24	Tobolsko	Dilara Gadirova	A1
25	Tomsko	Konstantin Obracov	B1, B2

3. Aplikataj metodoj

Instrumetodo (en la malnovgreka lingvo: μέθοδος — vojo) estas interaga procezo inter instruisto kaj lernanto, direktita al atingo kaj realigo de konkreta instrucele.

Inter multaj metodoj de lingvoinstruado en la kursoj de Esperanto populariĝis du bazaj metodoj: miksita kaj situaci-komunika, ĉar la unua integras elementojn el diversaj metodoj, kaj la dua simulas realajn komunikajn situaciojn.

Metodoj	Baza lingvouzado: A1, A2	Memstara lingvouzado: B1, B2
Miksita metodo	47%	27%
Gramatika metodo	-	12%
Situaci-komunika metodo	21%	30%
Rekta metodo	16%	13%
Aŭdvida metodo	8%	6%
Lingvaj ludoj	8%	12%

4. Lernolibroj kaj instrumaterialoj

Lernolibro estas libro sisteme prezentanta sciojn pri iu konkreta objekto aŭ scienca fako, uzata kiel por engrupa tiel por memstara lernado. Tradicie la movadaj kursoj de Esperanto ne estas tro longdaŭraj, kaj kursgvizitantoj en la pli multo da okazoj volonte uzas proprajn instrumaterialojn, des pli ke tio bone kongruas kun plej ofte aplikataj metodoj: la miksita kaj situaci-komunika kaj samtempe referencas individuajn multfoje aprobitajn spertojn de multaj spertaj instruistoj. La suba tabelo montras, kiuj lernolibroj kaj kiomfoje estis uzataj en kursogrupoj.

Baza lingvouzado: A1, A2		Memstara lingvouzado: B1, B2	
Propraj instrumaterialoj	9	Propraj instrumaterialoj	5
A. Юнусов «Эсперанто? Это просто!»	2	Б. Колкер «Полный курс языка эсперанто»	2
A. И. Королевич «Книга об эсперанто»	2	Zlatko Tišlar “La Zagreba metodo”	1
З.В. Семёнова, М.И. Исаев «Учебник языка эсперанто»	2	Anna Löwenstein “Esperanto rektmetode”	1
Б. Колкер «Экспресс-курс «Эсперанто за 10 часов»»	1	Stano Marček “Rekta metodo de Esperanto”	1
Legolibroj por komencantoj	1	C. Piron “Gerda malaperis!”	1
Instrumaterialoj de la retejo Lernu.net	2	Legolibroj	1

5. Kursfinitoj

Kursfinitoj estas celgrupo, kiun kursorganizantoj kaj instruistoj ŝatus plu vidi en esperantista rondo.

5.1. Daŭre rimarkeblas la aktuala kaj objektiva tendenco, ke nombro de kursanoj en grupoj reduktiĝas al minimumo, kaj sekve bedaŭrinde ankaŭ la fina nombro de la kursfinitoj rezultas ne tre granda. Al baznivela movadaj kursoj plej ofte aliĝas homoj el la aĝa diapazono de 20 ĝis 30 jaroj, kiu estas ekzakte plej defia aĝo, kiam oni devas aktive solvi gravajn sociajn, familiajn, profesiajn problemojn en sia vivo, dum Esperanto en ĉi tiu vivperiodo povas okupi nur niĉon de interesa ŝatokupo. Aparta temo por studi ĉi tiun problemaron estas motivoj, kiuj venigas al ĉeestaj kursoj dezirantojn lerni Esperanton.

	Baza lingvouzado: A1, A2	Memstara lingvouzado: B1, B2
Nombro de kursfinintoj	70	36
Averaĝa aĝo de kursfinintoj	27 jaroj	37 jaroj
Averaĝa nombro de kursanoj en unu grupo	5 personoj (14 grupoj)	5 personoj (7 grupoj)

5.2. Taksado de lingvokonoj kaj parolkapabloj de lernantoj apartenas al gravaj elementoj de kursoj. Ĝi kronas la studadon, liveras faktojn kaj materialon por la analizado de rezultoj, sukcesoj, mankoj kaj montras strategiojn por plua agado. En la movadaj kursoj unueca deviga formo de kontrolo fine de studado mankas, kaj en la triono de kursoj la taksado de lingvokonoj ne okazis. En la cetera parto de la kursaro instruistoj elektis por kontrolo kaj malstreĉajn taskojn (intervjuado de kursanoj fare de kursgvidanto, monologa sinprezento de kursanoj, interaga parolado dialogforma) kaj taskojn, kiuj postulas pli fundajn lingvokonojn (leksika kaj gramatika ekzameno, testado, traduktasko, skriba verko). En la B-nivela grupo de Irina Gonĉarova estis prove plenumataj KER-ekzamenaj specimenoj.

5.3. Atestado de kursanoj. Per atestado finiĝas definitive ĉiu kurso aŭ sukcesa ekzameno, ĉar la atestilo estas dokumento, kiu pravas al ĝia posedanto la trapason de koncerna kurso, eble ankaŭ la atingitan nivelon de lingvokonoj. En la triona parto de la studgrupoj kursanoj estis neniel atestitaj. Parte tion klarigas la movada kaj privata tipoj de kursoj. Pro la sama kaŭzo en pluraj kursoj al komencantoj estis enmanigitaj kiel simbolaj atestiloj Esperantaj memoraĵoj: libroj, insignoj ktp. Nur malofte kursfinintoj estis atestataj per certigilo pri la vizitado de kurso aŭ per atestiloj pri kursofino. La finintoj de baza kaj progresiga kursoj ĉe Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) en Moskvo ricevas post la sukcesa ekzameno universitatajn atestilon aŭ diplomon pri plialtigo de kvalifiko kiel oficialan aldonajon al la universitata diplomo.

6. Instruistoj

6.1. Instruistoj, kiuj gvidis kursojn kaj kontribuis por ĉi tiu raporto: Aleksej Borodin (st. Otradnaja, Krasnodara regiono), Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino), Dilara Gadirova (Tobolsko), Artur Grigorjev (Moskvo), Irina Gonĉarova (Odincovo), Konstantin Ĥlizov (Jekaterinburgo), Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburgo), Roman Jefremov (Glazovo), Tatjana Kolajeva, Nina Lvova (Novokuznecko), Vasilij Masjagin (Omsko), Konstantin Obrazcov (Tomsko), Vladimir Opletajev (Surguto), Andrej Rjancev (Murmansko), Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko), Nikolaj Solomencev (Kostromao), Anna Striganova (Moskvo), Tatjana Vŝivceva (Miasso), Darja Zelenina (Ĉelabinsko).

6.2. Eminentaj Esperanto-instruistoj de la lernojaroj 2017 – 2018.

Junie de 2018 la Estraro de REU decidis proklami sinjorinon Irina Gonĉarova “Eminentaj Esperanto-instruistoj de la lernojaroj 2017—2018” pro ŝia sukcesa gvidado de pluraj diversnivela Esperanto-kursoj, aktiva apogado kaj lertigo de kursfinintoj prepare al KER-ekzameno, diskonigo de propraj instruistaj spertoj. Irina Gonĉarova estas diplomita instruisto pri la rusa lingvo kaj literaturo, trejnita Esperanto-instruisto pri Ĉe-metoda instruado, magistro pri pedagogio de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, kreinto kaj antaŭeniganto de la propra aŭtora Esperanto-kurso FaRo (“Faru la rondon!”).

Tio estas nova iniciato de la Estraro, kiu povas iĝi bela tradicio por honorado de elstaraj rusiaj instruistoj de Esperanto.

7. Kursoj por blinduloj

Daŭre funkcias la instrua retportalo “Esperanto-lando” por blindaj esperantistoj kaj lernantoj de Esperanto, iniciatita kaj gvidata de Nikolaj Vasljeviĉ Solomencev (Kostromao), kiu mem voĉlegis kaj sonregistris por blinduloj la lernolibrojn de A. Masenko kaj B. Kolker. La portalo uzas la voĉkomunikilon Team Talk v 5.1.7., kaj la instruado de Esperanto okazas en kvar trinivela grupoj. Ekzemple en la perfektiga kurso estas uzata la lernolibro de Boris Kolker “Vojaĝo en Esperanto-lando”. <https://www.youtube.com/watch?v=fZI9DptB9Y4>

8. Problemoj kaj taskoj

- 1) Tradicio pri informado kaj raportado pri gvidataj kursoj mankas. Tre malofte rusiaj kursgvidantoj registras aktualajn Esperanto-kursojn ĉe la kursejo de la populara internacia retejo Edukado.net kaj ankaŭ preskaŭ ne kutimas aperigi koncernajn informojn en la landaj dissendolistoj kaj informiloj.
- 2) Kursgvidantoj ne verkas por publikigo artikolojn pri instru-metodikaj temoj kaj pri siaj didaktikaj spertoj.
- 3) Plej multaj okazigataj kursoj estas movadaj kaj privataj. Pluraj funkciaj kluboj aŭ societoj ne povas organizi kursojn pro manko de kapablaj instruistoj kaj de konvenaj kursejoj.
- 4) Preskaŭ ne fosata estas la tereno de oficialaj aŭ fakultativaj universitataj, kolegialaj kaj lernejoj kursoj, kvankam ili ĉiuj estas eblaj, se troviĝas diplomitaj instruistoj kaj dezirantoj lerni Esperanton. Sola escepto: RUDN kaj la kursoj, organizataj de Anna Striganova kaj Dmitrij Ŝevĉenko.
- 5) Esperantistaj kluboj malmulte zorgas pri seninterrompa kontinuuigo de la instruado de la baza ĝis pli altaj niveloj. Ankaŭ klubaj progresigaj kursoj tre malmultas, ĉar kluboj tre malofte proponas konkretan daŭrigan kurson. Sola escepto: la kurso FaRo, gvidata de Irina Gonĉarova, kiun sekvas ŝia progresiga kurso por prepari komencintojn al la KER-ekzameno.
- 6) Integriĝo de kursfinintoj en la esperantistan komunumon ofte ne estas antaŭplanata kaj apogata de esperantistaj kluboj kaj rezulte ĝi submetiĝas al faktoroj de hazardo.
- 7) Ne funkcias regulaj trejnadaj de Esperanto-instruantoj por lertigi kaj kapabligi ilin cele al profesiiĝo kaj al pli efika gvidado de diversnivela kursoj.

La Estraro de REU kaj la aŭtoro dankas esperantistojn el diversaj regionoj de Rusio, klubgvidantojn, aktivulojn por ilia helpo, subteno, kunlaboro, sugestoj, akurataj poŝtaj respondoj: Sergej Abramov (Uljanovsko), Ikar Akimenko (Barnaulo), Aleksandr Blinov (Ĉeboksaro), Eŭgeno Bojĉin (Birobiĝano), Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino), Irina Gonĉarova (Odincovo), Dmitrij Piminov (Ust-Ilimsko), Roman Jefremov (Glazovo), Tatjana Kaminina (Orenburgo), Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo), Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko), Svetlana Smetanina (Moskvo), Nikolaj Solomencev (Kostromao), Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo), Irina Zajceva (Vladimiro) kaj multaj aliaj.

*Vladimir Opletajev,
estrarano de REU pri la instru-metodika agado*

Novaj libroj

Anna Striganova. Fabeloj pri amo. Serio "Fabelaj sekretoj". Impeto, 2018. – 48 paĝoj, ilustrita. ISBN 978-5-7161-0302-3

Kvina el la setio de malgrandaj libroj de A. Striganova "Fabelaj sekretoj". Ĝi konsistas el 22 malgrandaj historioj, kiujn ilustras fotoj de pupoj, kreitaj de la aŭtorino.

Prezo – 130 rubloj. Por akiro turnu vin al la eldonejo “Impeto”: http://lernolibro.ru/fabeloj_amo



Konstanteno Balmonto. Mi venis al la mond' por vidi Sunon. Tradukoj de 33 elektitaj poemoj fare de Ludmila Novikova k.a. REU, Moskvo-Ŝujo, 2018. 80 paĝoj, ilustrita.

La libro estas dediĉita al Rusiaj Esperanto-Tagoj en la urbo Ŝujo 01.-09.07.2018. Kompilis, antaŭparolis, aranĝis kaj enpaĝigis Nikolao Gudskov. La poemojn tradukis Ludmila Novikova; krome, kelkajn poemojn tradukis Tatjana Auderskaja, Mikaelo Bronŝtejn, Irina Gonĉarova, Nikolao Gudskov, Igor Kaliniĉev, Klara Ilutoviĉ, Mikaelo Povorin.


Ĉiu poemo estas prezentita en la rusa originalo, kiun sekvas la esperanta traduko (foje – 2-3 malsamaj tradukoj). Ĝin akompanas antaŭparolo pri la vivo kaj kreado de Balmonto kaj artikolo “Balmonto-tradukisto”.

Prezo – 130 rubloj. Por akiri la libron turnu vin al Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru.



Niaj amaskomunikiloj

Tri jaroj de Esperanto: Первый канал



<https://www.youtube.com/channel/UCmXNo743zPZTgb1xmHFiUDA>

Tri jarojn antaŭe, la 30-an de aŭgusto 2015, Moskva Esperanto-Asocio MASI startigis sian jutub-kanon "Esperanto: Первый канал". Nun ĝi jam havas 115 videojn, pli ol 1300 abonantojn el diversaj mondopartoj kaj ĉ. 66500 rigardadojn.

Krom Esperanto-lecionetoj, diversstemaj prelegoj kaj poeziaj paĝoj ĉi tie troviĝas la plej riĉa en jutuba Esperantujo kolekto de intervjuoj kun esperantistoj el la tuta mondo. Ĉi-aŭguste aperis 9 videoj pri la 9-a KERSesio en Moskvo kaj nun venas elstara serio de intervjuoj el la Lisbona UK-103.

Ni gratulas ĉiujn partoprenintojn de la laboraj procezoj kaj niajn aŭskultantojn-spektantojn! Grandan dankon al ĉiuj! Restu kun ni! Kunlaboru kun ni! Skribu komentojn! Abonu nian kanalon:

Irina Gonĉarova

Instruado tra la mondo

Malkovro de konata lando

Instrui Esperanton eksterlande jam estas pli-malpli kutima dumferia okupo por mi, sed ne ĉiam facila kaj postulanta certan prepariĝon. La unua sperto estis en iama Ĉeĥoslovakio, Lančov-tendaro¹, en 1980; poste sekvis kelkaj landoj de okcidenta Eŭropo kaj Sud-Azio. La pasintan someron mi instruis Esperanton en Uzbekio, lando iasence nova por ni, rusianoj; relative proksima kaj distance, kaj certagrade pensmaniere, kaj historie: ja Rusio kaj Uzbekio estis nedisigeblaj partoj de unu ŝtato, Sovetunio, dum 67 jaroj. Tamen, ĉio estas vere relativa, ĉar por atingi Uzbekion el Moskvo oni devas flugi ≈ 4 horojn (ĉ. 3000 km). Historie Uzbekio estas pli multaĝa, ol Rusio, kaj tion atestas antikvaj arkitekturaj monumentoj, precipe de islama religio – moskeoj kun solidaj minaretoj, madrasoj kaj diversaj islamaj centroj – dissemataj tra la tuta lando kaj bone konserviĝintaj kaj konservitaj ĝis nun. Etoson certe formas, nelaste, la lingvo, ĉi-foje – la rusa, kiu estas parolata en Uzbekio diversnivele. Tial mi instruis Esperanton en Uzbekio ne ĉiunmomente rektamete.

En la malproksima 1974 jaro mi vizitis Taŝkenton kaj Samarkandon dum vintraj studentaj ferioj kun unu el miaurbaj Esperanto-amikinoj. De tiu tempo multo ŝanĝiĝis. Uzbekio estas jam eksterlando, feliĉe senvaluta por rusianoj, kun sia nova valuto kaj sia nova, laŭdata de loĝantaro, prezidento, novtipaj entreprenoj kaj novaj diversspecaj projektoj... La lando iĝis iunomente nerekoncible. La centraj urbaj distriktoj plivastiĝis, aperis modernaj konstruaĵoj, muzeoj kaj monumentoj. En Taŝkento daŭre funkcias (ekde 1977 jaro) metroo, iuloke restaŭrigita, 5-oble pli malmultekosta, ol en Moskvo, sed same komforta, pura kaj bela.

La unua urbo, al kiu mi venis, estis Samarkando² kaj kie dum sovetia epoko Esperanto-movado disfloris: tutsovetiaj kaj regionaj Esperanto-aranĝoj, komenco de la artista kariero de Ĵomart kaj Nataŝa³, jekaterinburga Esperanto-aktivulino Raja Kudrjaveva eklernis la lingvon en Samarkando dum siaj studentaj jaroj... Kiam Uzbekio sendependiĝis, situacio de Esperanto memkompreneble ŝanĝiĝis pro konataj al ĉiuj ni postperestrojkaj sekvoj... La ŝanĝoj, kiuj okazis dum 1990-aj jaroj kaj sekvis poste, certe grave influis ankaŭ al loka Esperanto-aktivo... Tamen la nomo de la internacia lingvo estis regule aŭdata dum okazigo de diversaj projektoj de la urba kulturcentro “Amir Temur”⁴, kie laboras Anatoli Ivanoviĉ Ionesov⁵, multjara kaj sperta loka



esperantisto. Li lanĉis kaj organizis diversajn kulturajn projektojn laŭplane de la kulturcentro. De tempo al tempo tiuj projektoj interplektiĝas kun ebleco informi pri Esperanto, kion Anatoli I. profitas.

Anatoli I. multe klopodis por organizi ĉi-julian Esperanto-kurson, nominte ĝin projekto dediĉita al la Internacia UNO-Jardeko por Proksimigo de Kulturoj en kadre de la proklamita en Uzbekio la Jaro de subteno de aktiva entreprenado, novigaj ideoj kaj teknologioj – aperis anoncoj paperformaj ene de la biblioteko, kie okazis lecionoj de Esperanto kaj artikoloj en diversaj urbaj kaj kelkaj landaj elektronikaj gazetoj⁶. Multe helpis en organizo de la Esperanto -kurso la urba inform-biblioteka centro, ĝia estrino kaj bibliotekistoj de la fremdlingva fakto, kie okazadis lecionoj de Esperanto. Ĝuste ili kontribuis al instaligo de la fakto kun Esperanto-literaturo, kiu apartenis al iama Esperanto-klubo kaj persona E Esperanto-biblioteko de A. Ionesov. Ankaŭ mi aldonis kelkajn Esperanto-librojn al tiu ĉi fakto.

Rapide trapasis la unusemiana intensiva kurso. La lastan tagon estis organizita specialforma ekzameno, t.n. interparolado kaj enmanigo de diplomoj al E-kursfinintoj. La reaktiviĝanta esperantisto, Bahodir Ĥabibov, profesia lingvoinstruisto, pretis daŭrigi Esperanto-instruadon al la kursfinintoj. En 1998 li kunaŭtore kun A. Iopnesov. eldonigis en la «Impeto» Esperanto-lernolibron en la uzbeka lingvo.

En Samarkando mi havis tre interesan sperton, tre simpatiajn kaj kapablajn diversajajn kaj diversnaciajn gekursanojn, tre varman kaj amikan etoson kaj varmegan eksteran temperaturon, ĝis +50 °C!!!...

Nuntempe en Uzbekio funkcias trajno de alta rapideco (averaĝe 250 km/h) nomata «Afrosiab» (Afrosiab estas la loko norde de la urbo, kie situas la antikva Samarkando). Ĉi trajno ligas la urbojn Taŝkento⁷, Samarkando kaj Buĥoro/Buĥaro⁸. Do, ne estis bezonate multe da tempo por atingi la uzbekian ĉefurbon – pli da zorgoj postulis aĉetado de la trajnbileto: tro da dezirantoj vojaĝi somere en komfortaj kaj klimatizitaj vagonoj.

En Taŝkento ĉe la vagono mi estis renkontata de Gafur Mirzobajev, multjara esperantisto. Malgraŭ jam delonga neuzo de la lingvo, Gafur lerte parolas Esperanton. Eble, iu el sovetianoj memoras lin? Lia antaŭa aktivado ne estis longa, sed sufiĉe aktiva: Gafur prezentis kelkajn Esperanto-kantojn dum la fonda REU-Konferenco en Kolomna en 1991, partoprenis kun siaj, tiam junaj, gefiloj la UK-on en 1995 (Tampere, Finnlando). Li konservis agrablajn rememorojn pri la renkontoj kun Irina Gonĉarova kaj gastamon en Moskvo de Ludmila Novikova. Al ili ambaŭ Gafur petis transdoni siajn varmajn salutojn kaj bondezirojn!



Kelkajn monatojn antaŭ mia alveno Gafur M. kun siaj E-geamikoj sukcesis jure registri la Uzbekan Esperanto-Asocion (UzEA), kio estis klopodiga, kaj iĝis ĝia prezidanto. La UzEA nun havas multajn kaj interesajn agadplanojn. Kaj unu el primaraj – kreskiĝo de geesperantistoj en Taŝkento. La iom malfrue trovita E-kursejo estis vere paradiza loko: klimatizita klasĉambro kun ĉiuj bezonataĵoj por instruado en urba junulara centro. Tamen oni ne povis plene profiti ĝin. oni ŝatus havi pli da ĝelernantoj en tiu ĉi senpage disponigita ejo. Sed feliĉe tiuj, kiuj venis, plejparte gejunuloj, kaj partoprenis Esperanto-lecionojn, estis diligentaj gekursanoj pretaj daŭrigi 10 tagan E-lernadon, jam sub gvido de Gafur M., al kiu mi donacis kelkajn librojn eldonitajn en la «Impeto» kaj transdonis speciale pretigitan materialon kaj lecionaron en elektronika formo. Fine de ĉi-septembro Esperanto-kurso estos daŭrigota en la sama klasĉambro de la junulara centro.

Mi ŝatus nepre aldoni, ke Gafur Mirzobajev estas lernanto de Eŭgeno Perevertajlo, Esperanto-aktivulo konata dum sovetia epoko. Bedaŭrinde, subita forpaso de Eŭgeno haltigis Esperanto-aktivadon en Taŝkento. Por omaĝi al Eŭgeno Gafur veturigis min (laŭ mia pli frua retmesaĝa peto) al la tombejo ≈ je 20 km for de Taŝkento, kie mi metis kamomilojn sur la tombon de Eŭgeno, persono, kiu multe E-instruis kaj propagandis Esperanton, dum multaj jaroj gvidis lokan Esperanto-klubon, publikigis Esperanto-lecionaron en la revuo „Soveta Uzbekio“ ktp. Kun Gafur ni provis trovi vivspurojn de alia konata E-veterano – delonge forpasinta P.V. Poliŝĉuk veturinte al la domo, kie li loĝis. Sed tie loĝas jam aliaj homoj, nur najbaro donis iom magrajn informojn pri nia samideano.

Forlasante Uzbekion oni adiaŭas tamen iom malkovrinte la landon de la Silka Vojo (mi vizitis ankaŭ la urbon Buĥaro), kiu multe evoluis dum la lastaj jardekoj, sed restas alloga pro siaj malnovaj tradicioj, kiuj daŭre regas kaj okulfrapas per kutime surmetataj buntkoloraj naciaj vestaĵoj kaj okazigataj pompaj edziĝfestoj por 300 gastoj, popularaj bongustegaj pilafo kaj lagmano, abundo de legomoj kaj sukoplenaj fruktoj en bruantaj kaj bonodorantaj bazaroj, kie endas marĉandi, kaj nepras gustumi famajn melonojn „Torpedo“. Uzbekio estas unika lando, kaj ĉi tie ĉio estas nekomparebla: neordinare bonkoraj kaj gastamaj homoj, kiuj pretas konatigi vin kun riĉega kulturo de sia patrolando kaj per tio vi pli eksimpatias al ili kaj pli ekestimas ilin. Mi ŝatus bondeziri daŭran prosperon al la lando kaj ĝia popolo kaj revigligon de Esperanto-movado tie!

¹ Lanĉov-tendaro – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Lan%C4%8Dov>

² Samarkando – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Samarkando> ; <https://www.monato.net/2006/008920.php>

³ E-kanto «Samarkand» – <https://www.youtube.com/watch?v=c-Q3rJUmrDg>

⁴ Amir Temur – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Timur>

⁵ Ionesov A.I. – https://eo.wikipedia.org/wiki/Samarkando#Samarkando_kaj_Esperanto

⁶ Ruslingva artikolo – http://kultura.uz/view_2_r_11893.html

⁷ Taŝkento – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ta%C5%9Dkento>

⁸ Buĥaro – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bu%C4%A5aro>



TIĤVINAJ ESPERANTO METIEJOJ – 2019

Informilo 1

Karaj-karaj!

Tiĥvina Esperanto-klubo kun plezuro informas, ke la tradiciaj Metiejoj (TEM-oj) okazos ekde la 15-a ĝis la 21-a de julio 2019 en la tradicia loko – sporta bazejo apud

Carina Lago, 5 km de Tiĥvin.

Vi venos al tradiciaj metiejoj: movada, lingva, tradukista, sporta, kanta, diboĉa ... ankaŭ netradiciaj, kiujn rajtas proponi ankaŭ vi mem.

Okazos aro da ekskursoj, koncertoj, naĝadoj kaj aliaj umadoj sen fumado.

Funkcios kafajeto, librobuto, ludejo kaj arbaro kun diversaj beroj. La vetero ĉiukaze estos konvena por ĝui kaj la naturon, kaj la amikan etoson.

En kadroj de TEMoj okazos la 30-a (raport-elekta) Konferenco de REU.

Retejo de TEMoj-2019 ekfunkcios ekde la 20-a de septembro 2018 kun detalaj informoj kaj reta aliĝilo. Vi povos aliĝi ankaŭ perpoŝte, sendinte plenigitan aliĝilon al la adreso: Mikaelo Bronŝtejn, 6 Mikrorajon 1-17, 187556 TIĤVIN, Leningradskaja oblast, Rusio.

Ĉe aliĝo ruslandaj partoprenantoj pagu NUR aliĝkotizon, ĝironte la sumon al la bankokarto de Mikaelo Bronŝtejn (la numero aperos en la retejo). Alilandanoj pagu nenion – ĉiuj pagoj okazos ĉe via alveno.

La kotizojn kaj prezojn por TEM-oj ni prezentas ĉi-sube.

Celo	Karakterizo	Prezo	Rim.
Aliĝkotizo	Studentoj	200	rubloj
	Plenaĝuloj (25 – 60 j.)	500	rubloj
	Pensiuloj (post 60 j.)	300	rubloj
	Alilandanoj	15	euroj
	Infanoj ĝis 16 j.	-	-
Manĝado	3-foje dum tago	600	rubloj
Loĝejoj (1 persono por 1 tagnokto)	2-lita kun duŝo+necesejo	800	rubloj
	4-litaj (duŝo kaj necesejo en koridoro)	400	rubloj
	5-6-litaj (duŝo kaj necesejo en koridoro)	300	rubloj
	Propra tendo (uzo de duŝo/necesejo)	100	rubloj

Rim.: 1. Estas nur 6 loĝejoj kun duŝo kaj necesejo. Ŝatantoj de komforto povas lui loĝejojn en hoteloj de la urbo;

2. Al aktivaj partoprenantoj de la programo la aliĝkotizo estos repagita. Antaŭvidatas ankaŭ aliaj subtenrimedoj por aktivaj partoprenantoj.

La 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

Litova Esperanto-Asocio (LEA) invitas al la tradiciaj 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55), kiuj okazos la 6–14an de julio 2019 en **Panevėžys**. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio. BET-55 estas dediĉita al la centjariĝo de LEA.

En la programo: Somera universitato, diversnivela Esperanto-kurso, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debato pri la Esperanto-movado en la Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencoteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

Aliĝkotizo

Ĝis la 31a de decembro 2018: 35 eŭroj por esperantistoj el ekssovietuniaj kaj ekssocialismaj Eŭropaj landoj; 55 eŭroj por esperantistoj el ĉiuj ceteraj landoj. Ekde la 1a de januaro 2019 la aliĝkotizo por ambaŭ aliĝkategorioj kreskos je 10 eŭroj, respektive, ĝis 45 kaj 65 eŭroj. La aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de la kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

Aliĝu rete ĉe: www.esperanto.lt/aliĝxilo_BET.html

Grave! Personoj, kiuj grave kontribuos al la programo aŭ/kaj signife helpos organize, ne pagos la aliĝkotizon.

Vizoj: al Litovio senvice rajtas veni la civitanoj de ĉiuj landoj de EU kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj petu vizojn ĉe Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turmu vin al LEA, kiu sendos oficialan inviton.

Loĝado: en bone prizorgataj kaj renovigitaj studentaj domoj de la fakultato (str. Klaipėdos 27) kaj de urba kolegio (str. Klaipėdos 31), ambaŭ en la urbocentro. Loko en dulita, trilita aŭ kvarlita ĉambro kostas 10 eŭrojn por unu tagnokto. Oni povas loĝi ankaŭ en diversnivela kaj diversprezaj hoteloj de la urbo. Mendu memstare aŭ petu helpon de la Organiza Komitato.

Manĝado: En la kafejo de la Scienca kaj Teknologia parko (str. Žemguliai 46). Unutaga bonkvalita trifoja manĝado kostas 10 eŭrojn. Nur tagmanĝo kostas 4 eŭrojn. Vegetara manĝado estas ebla.

Pli detalaj informoj pri la aliĝoj, pageblecoj, loĝado, manĝado k. a. estas legeblaj en la [retejo de BET-55](#) kaj en [Facebook](#).

La Organiza Komitato

Poŝta adreso: p. k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio

Telefonoj: +370-687-12219; +370-686-69875

Retadresoj: litova.ea@mail.lt; irenaa.alijosiute@gmail.com; pjgorovas@yahoo.com

Bonvenon al Litovio!



Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "RUSIA ESPERANTISTA UNIO"

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio